

74

(92)



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero: 7 FF. Abono por 1988 kun adresaro: 35 FF

P&ek: 3371 74 M BORDEAUX, Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque

\*\*\*\*\*

### ENHAVO

* Nikaragvo estas malproksima ( <b>Renato Corsetti</b> )	... 2
* EKOLOGIO - ĈU IDEOLOGIO? ( <b>Wolfgang Gunther</b> )	... 3
* Nedogmaj pensoj antaŭ la nova jarmilo ( <b>Justo</b> )	... 15
* Vortoj de Maljunulo ( <b>Valo</b> )	... 21
* Pelto de Princo Urusov ( <b>A. Visoĉenko</b> )	... 25
* Alkroĉe al la vivo ( <b>Nikolin</b> )	... 32
* Mirfabelo ( <b>Tesa</b> )	... 35
* Maltrankvila vespermanĝo ( <b>Lina Gabrielli</b> )	... 38
* Krucvortenigmo ( <b>Sfinksido</b> )	... 42
* Ĉies voĉo : Ĉu ni devas respekti ĉiujn religiojn? ( <b>Edgard Jamart</b> ), Ni revenu al la fonto ( <b>A. Lopez Luna</b> ), Ĉu riĉeco? ( <b>Valo</b> )	... 43
* La Amikeca Reto ( <b>Nicole D., Gerardo Rollin</b> )	... 47
* Katalogo de SAT-Broŝurservo/Laŭte!	
* Du nebanalaj helpo-petoj	antaŭlasta pago
* Novaĵoj de SAT-BS/L!	lasta pago

"Antaŭ unu jarcento Marks povis kun ŝajna pravo aserti, ke alternativo al socialismo estas barbareco. Eĉ se ege tragika estis tiu ĉi, la homaro povis esperi elsaviĝi. Hodiaŭ la situacio fariĝis multe pli grava. Pro la ekologia krizo la elektoj, kiujn povas fari la socio rilate sian estontecon, fariĝis multe pli decidigaj. Ni aŭ realigos ekosocion fonditan sur la ekologiaj principoj, aŭ regresos kiel specio. Tio ĉi ne estas, laŭ mi, apokalipsa retoriko. Ĝi estas scienca juĝo, kiun tagon post tago pravigas la vivprincipo mem de nia nuntempa socio."

**Murray Bookchin** (konkludo de "Por ekologia socio")

## NIKARAGVO ESTAS MALPROKSIMA

Antaŭ kelkaj jaroj tuta generacio en kelkaj eŭropaj landoj estis konata kiel la "vjetnama generacio". Tiam ni pensis ke ne estas juste ke granda lando agresas malgrandan landon, ktp. ktp.

Tempoj ŝanĝiĝas kaj homoj ŝanĝiĝas. Nun, evidente, pensoj pri diskriminacio kaj justeco/maljusteco iĝis provizore eksmodaj.

Eble pro tio okazaĵoj en fora Nikaragvo (fora el Eŭropo, kompreneble) ne tiom altiras altiron. Eble pro tio la usona prezidanto kaj la usona parlamento kaj pluraj aliaj usonaj instancoj kaj individuoj povas tute trankvile kaj publike decidi interveni en fremdan landon sen la minimuma riproĉo flanke de la kutimaj gardostarantoj pri homaj rajtoj.

Io maljusta, kontraŭjura, abomeninda okazas inter Usono kaj Nikaragvo, kaj ĉiuj trankvile plurigardas la giganton, kiu piedbatas la infanon.

Pro tio mi opinias ke esperantistoj, kiuj almenaŭ diras ke ili komprenas ion pli ol la ceteraj homoj pri internaciaj rilatoj, devus montri ke ili ne estas same blindaj aŭ vid-rifuzantaj.

Tiurilate prezentiĝas nun unu tre bona ebleco. Juna franca esperantisto kunlabore kun nikaragvaj esperantistoj klopodas aranĝi esperantistajn restadojn en tiu fora lando, por simple koni la situacion sed ankaŭ por helpi pri difinitaj evolu-projektoj.

Se vi estas spirite juna kaj se vi ŝatas utopiojn, kiel ekzemple justecon en internaciaj rilatoj, kial ne kontakti la junan francan (Jean-Louis Husse, 131 rue de la Merigotte, F-86000 Poitiers, Francujo), aŭ ne disvastigi ĉi tiun informon inter viajn esperantistajn konatojn?

**Renato Corsetti**

### Nia kriminala felietono :

La tribunalo de Douai apelacie konfirmis la verdikton kontraŭ la soldatserv-rifuzanto Eric Hébert: 14 monatojn da mallibero. Provizore Eric troviĝas en la malliberejo de Douai, sed li petis translokigon al sia regiono, kaj esperas esti sendata al Rouen. Adreso de Eric en Douai:

**Eric Hébert, N° 12173 338 B, F 59507 DOUAI Cedex**

(kutime la puna administracio pluensendas leterojn alvenintajn por translokita malliberulo).

## EKOLOGIO - ĈU IDEOLOGIO ?

Pri la biologia deveno, neŭtralaj ecoj kaj aplikoj de la ekologia paradigmo.

kompilis **Wolfgang Gunther**  
Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)

1987

Wolfgang Gunther  
Schulstr.7, D-3501 Ahnatal 1, FRG

"Ĝustadire la blankulo fidas nur je psikologiaj, sociologiaj kaj fizikaj leĝoj. La indiano malsamas. Li fidas la vivon mem."  
(Tristram P. Coffin)

### 1. PRI LA PROBLEMO

La demando, ĉu ekologio estas (nova) ideologio, venas el la politika sfero de la homo, ne el la scienca. Pro tio ĝi rilatas al potenco, al potenco de homoj super homoj.

Ekologia pensado ekeniĝis en politikon nur de kiam la ebleco de ekologiaj katastrofoj postulas tion ĉi arkaŭ de la tiel nomataj tradiciaj partioj aŭ ideologioj. Ĉar tiam de la homo pri morto kaj detruo estas sendependa de ŝia/lia aparteneco al tradiciaj filozofiaj, politikaj kaj/aŭ sociaj pensomodeloj. Ni rigardas al la akcidentoj kaj katastrofoj de Three Mile Island,

Chernobil, la arbaromortado en grandaj partoj de la mondo, la arido- kaj malsato-katastrofoj kun iliaj milionoj da mortintoj, la premo de la kreskanta mondloĝantaro, la ĝenerala veneniĝo de la biosfero kun plimultiĝo de la respektivaj malsanoj kiel alergioj kaj neŭrodermatito ktp. Kaj ekologia pensado jam igis kelkajn partiojn ekologie agi. La konsekvencoj de tiu agado ŝanĝas konstituciojn kaj partiprogramojn kaj ĉe la potenculoj ekestas devigoj al agado kun investo de materialo kaj mono.

Sed la establitaĵoj grandpene provas prezenti la videbligintan krizon kiel de homo sukcese mastreblan paneon kaj la akutajn perturbojn kiel pure homan fiaskon. Oni vane serĉas principan kritikon de la propra valorosistemo, de la propra ideologio. Pli gravas al la malnovaj sistemoj prezenti ankaŭ ekologion, precipe kie ĝi manifestiĝas kiel politika ekologio, t.e. kiel politika ambicio ekz. forme de eko-partioj, kiel malbonan kaj netaŭgan ideologion. Ĉi tiu reduktas la problemon sur la nivelon de konataj ideologiaj potencokonfliktoj. Oni ne diskutas la farbon, sed la manieron farbi.

Nia problemoj eblas do pro tri kialoj. Unue apartenas al la rekoniloj de nia hodiaŭa scienc-teknik-ekonomia tempo rigardi ĉiujn aferojn, ankaŭ ideojn, en la kadro de iu tutpolitika koncepto, de iu ideologio. Due en la ĉiutaga batalo de la politikaj fortoj la nocio de ideologio ĉefe estas uzata por la politika kontraŭulo en la senco de karakterizado de ties interesoj. Trie vere ja ekzistas en la formo de la eko-partioj kaj civitanaj iniciativoj politika ekologio, kiu dum strebado al realiĝo en la politiko klopodas, konkurante kun aliaj, atingi laŭeble plej multe da potenco.

## **2. PRI LA NOCIO DE IDEOLOGIO**

La hodiaŭa ĝenerala kutima apliko de la nocio ideologio povas esti karakterizata jene :

### **2.1. Laŭ enhavo kaj funkcio**

Ideologioj entenas tutaĵojn de ideoj, konceptoj, opinioj, konvinkoj kaj nocioj pri la sociala kaj politika realo de la socio kaj la mondo. Ili strukturigas la socialan realon de la homo por ebligi agadon en ĝi, plej ofte sen problemigo de la ekzistantaj dilemoj. Ili priskribas la konscion de sociaj grupoj en la paso de historio kaj pretendas verecon kaj ĝeneralan validecon. Ideo-

logio do estas samtempe funkcio de sociaj procesoj kaj efektivigilo de sociaj funkcioj.

### **2.2. Laŭ deveno kaj funkcio**

La scienca juĝo rilatas al empirie perceptebla spac-tempa realo, ĝi celas konformecon kun la lasta. Kontraste al tio la ideologio estas valorjuĝo ; ne objektiva ekkono pri la realo, sed interpretado de la propra rilataro al ĝi. La ideologio last- instance ĉiam trovas sin mem en sia ideologio.

La pola marksisto Kolakowski ĉi-koncerne rimarkigas : "Ideologio estas la sumo de la konceptoj, kiu servas al socia grupo (klaso, sed ne nur al ĝi) por la organizado de siaj valoroj, kiuj esprimas la mistifikitan konscion de ĉi tiu grupo kaj ĝian agadon. La sociala funkcio de ideologio konsistas en la firmigo de la valoroj, kiuj necesas por sukcesa agado en la grupo... Ideologio entenas valorigajn kaj priskribajn juĝojn, kiuj jam... estas esprimo de la kreo je iuj valoroj aŭ subordigas ilian enhavon al la firmigo de la kreo kaj de la valoroj... La diferenco inter ideologio kaj scienco ne estas diferenco inter mensogo kaj vero. Ili diferencas per siaj sociaj funkcioj kaj ne per la grado de sia vereco... La ideologio estas determinata per sia funkcio, kiu konsistas en la organizado de valoroj... La ekzisto de socia konscio dependas de ideologiaj enhavoj."

### **2.3. Laŭ celo kaj funkcio**

La nocio ideologio ofte uzatas kiel malŝata etikedo por interpretaĵoj de la socia realo, malantaŭ kiuj troviĝas certaj interesoj. En tiu senco ideologio estas sistemo de konvinkoj kaj nocioj, kiu servas al la sukcesigo de potencintereso kaj, por plenumi ĉi tiun funkcion, prezentas parte fuŝkonture la socialan kaj ekstersocialan realon.

### **2.4. Ekzemploj de ideologio**

#### **2.4.1. Ideologio de la sociala merkatekonomio**

En FRG la ideologio de la t.n. sociala merkatekonomio vualu la preskaŭ neŝanĝitan strukturon de la kapitalismo, kiu estas bazo de ĉi tiu sistemo. La kapitalisma sociologio asertas, ke la konkurenco en socio kaj ekonomio kvazaŭ naturleĝe sekvigas ties laŭeble plej bonan evoluon kaj la progreson por ĉiuj homoj. Sed ĝustas nur la parta eldiraĵo, ke la konkurenco bone efikas rilate kvantecan kreskon de ekonomia produktado. Ideologia estas la ĝeneraligo kaj la samtempa ligado al pro-

prieta ideologio, laŭ kiu proprieto, precipe privata proprieto pri produktiloj, estas nerezignebla antaŭkondiĉo de progrescaj evoluoj. La sekvoj de privatekonomia konkurenco estas vualataj : la koncentriĝo de kapitalo en la manoj de malmultaj, la ĉiam pligrandiganta sociala malegaleco, la kelktempa sociala mizero de la plejmulto de la loĝantaro kaj la sociala kaj politika regado de malmultaj homoj.

#### 2.4.2. La ideologio de la komunismo

En la ideologio de la komunismo la diktaturo de la proletaro estu necesa transira tempo de kapitalismo al komunismo. Sed se oni analizas socialismajn kaj komunismajn regosistemojn, oni renkontas diktaturon de unusola partio, kiu estas organizata laŭ la principo de demokrata centralismo kaj ĉe kiu ĉiu potenco estas en la manoj de malgranda grupo (ekz. la "politburoo" en GDR).

### 3. PRI LA NOCIO EKOLOGIO

#### 3.1. Superrigardo

La hodiaŭa nocio "ekologio" estas multforma. Pro tio faras sencon interkonsenti en ĉiu unuopa kazo pri tio, kion oni celas per ĝi. En la sekvantaĵo estos prezentataj kvar penso- kaj agado-kampoj, kiuj estas decide priskribataj per la nocio ekologio.

Unue estas komprenata per ekologio pure biologia scienco pri la rilatoj inter vivestaĵoj kaj ilia medio. Ĉi-sence ideologio estas partoscienco de la biologio.

Due ekologio estas la doktrino pri la reciproke ligataj leĝoj de la tuta viva mondo. Ĉi-sence ideologio estas pontoscienco aŭ supera scienco de ĉiuj ceteraj pri la vivo okupiĝantaj sciencoj kaj la biologio estas nur parto de ĉi tiu pontoscienco. Tien ĉi apartenas la leĝoj pri la biokibernetiko.

Trie ekzistas ekologia etiko aŭ filozofio. Ĉi tiu evoluis tra la fundamenta novkonsiderado de la interrilataro inter civilizo, t.e. kulturo, kaj kreitaĵaro, t.e. naturo. Tiu nocieco de la ekologio enhavas porhome gravajn valorigojn, rezultantajn el la ekologiaj sciencoj.

Kvare ekzistas politika ekologio, tia, kia estas reprezentata

ekz. en la programoj de la ekologiaj partioj. Ekologio ĉi-sence signifas "Pensi terglobe - agi surloke!", ĉe kio la homo donas valorojn nur kadre de nedifektita vivo.

Ni povas kompari tiujn kvar penso- kaj agad-kampojn de la ekologio kun similaj de la Internacia Lingvo Esperanto. Al la simpla biologia scienco ekologio kiel unu scienco inter multaj analogas la "simpla" lingvo Esperanto kiel unu lingvo inter multaj. Al la pontoscienco ekologio kiel supera scienco, kiu povas akceli interkompreniĝon, analogas la pontolingvo Esperanto kiel supera lingvo kun sama celo. Al la ekologia etiko kiel idea konkretiĝo de la esenco de la ekologio por la homa socio analogas la Esperantismo, kiu forme de la interna ideo prezentas idean konkretiĝon de la esenco de Esperanto. Kaj fine analogas al la politika ekologio en la formo de politike aktivaj partioj la politike aktiva lingvo Esperanto en la formo de organizaĵoj, kiuj rigardas Esperanton ankaŭ kiel politikan enhavon aŭ aspekton de iu aparta koncepto.

#### 3.1. Ekologio kiel biologia scienco

Gravas scii, ke la vorto "ekologio" estas devenigita de la grekaj vortoj "oikos" kaj "logos". "Logos" signifas vorto-n en la senco de doktrino. "Oikos" signifas domo-n aŭ mastrumo-n en la senco de "loko por vivi". Ĉi tiu etimologia difino gravas pro tio, ĉar per ĝi ekdekomence en la nocio mem estas fiksata, ke ekologio celas la vivon kaj ne la homon.

La biologo kaj filozofo Ernst Haeckel enkondukis la nocion "ekologio" en la biologion en 1866 en sia "Ĝenerala morfologio de la organismoj" kaj skribis pri ĝi : "Per ekologio ni komprenas la tutan sciencon de la rilatoj de la organismo al la ĉirkaŭanta ekstera mondo, al kiu ni kalkulas en pli ampleksa senco ĉiujn ekzistokondiĉojn". La lasta parto de tiu origina difino anticipas per la vortoj "ĉiuj ekzistokondiĉoj" la postan pliampleksigon de la nocio en ĝian hodiaŭ validan porvivan formon. Ĉar al la ekzistokondiĉoj de organismoj kompreneble apartenas ankaŭ la homo kaj ŝia/lia civilizaĵo aŭ kulturo.

Ekologio do estas mediobiologio aŭ eĉ pli simple mediologio, la doktrino pri la mediaj rilatoj kaj vivobezonoj de la vivestaĵoj, inkluzive de la homo. Medio estas difinata unue sub la vidpunkto de iu specio kiel komplekso de por la specio vivonecesaj faktoroj kaj due sub la vidpunkto de la medio kiel tuto de ĉiuj en iu medio realigitaj vivopostuloj.

Ĉi tiu biologia medionocio prinomas tiujn sferojn de la naturaj vivokondiĉoj, kies tuto konsistigas la naturan medion : la sur la vivestaĵojn efikantajn vivajn kaj malvivajn ĉirkaŭojn : atmosfero, hidrosfero, litosfero, do, faktoroj kiel aero, akvo, klimato, ŝtonoj kaj grundospecoj, pejzaĝformoj, bestaro, plantaro samkiel homo kaj civilizacio. La ĝenerala ekologio sekve konsideras la naturon tuto kaj per tio fariĝis sintezo, liganta ĉiujn branĉojn de la natursciencoj. Per tio ĝi transpaŝis la kadron de la biologio kaj estas komprenenda kiel plej grava naturscienco, kiel "plej supera disciplino de la tuta naturscienco". Ekologia pensado ĉiam estas tuteca pensado.

Specioj kaj medio ordiĝas en ekologio laŭ speco de biologia sociiĝodoktrino. Ĝiaj bazaj nocioj de biocenozo (sociiĝo de organismoj en apartaj vivejoj) kaj biotopo (vivejo) atentigas pri la nedispartigebla kunaparteneco de ĉiuj biologiaj unuoj kun tiu medio, kiu estas la kondiĉo de ĝia viva ekzisto. Ĉi tiujn reciproke interrilatantajn unuojn de biocenozo kaj biotopo oni nomas ekosistemo, kies tuto formas la biosferon. Fundamenta estas ĉiam la rilato de strukturiĝa unuo al ĝia medio. La "ekstero" de la unuo devigas ĉi tiun, se ĝi volas postvivi, al stabiligo de limo kaj al interŝanĝo kun la medio trans tiun limon.

### 3.3. Ekologio kiel pontoscienco, "nova ekologio"

La biologia medionocio ampleksiĝas signife, se ni alkalkulas al la vivestaĵoj ne nur bestojn kaj plantojn, sed ankaŭ la homojn, kiuj ja same estas parto de la naturo kaj same rilatas al la naturaj faktoroj. Per tio aldoniĝas al la naturfaktoroj de la medio socialaj kaj kulturaj-civilizaj. La natura, t.e. biologiazfizika medio estas konsiderata en rilato al la ekonomie kaj teknike determinata medio kiel produktado- kaj infra(=sub)strukturoj, kaj al la politika-socia medio kun ties valor- kaj ordo-sistemoj. Per tio la ekologio estas ankaŭ doktrino pri la rilatoj inter homoj kaj naturo. Analizata estas la interrilataro inter la natura medio kaj la ŝanĝiĝaj socialaj, ekonomiaj, politikaj kaj kulturaj donitaĵoj. Objekto de tiel komprenata ekologio estas la tuta kompleksa interplektaro de la reciprokaj rilatoj kaj efikoj de ĉiuj vivestaĵoj kaj medioj.

Devenpunkto de la konstituigo kaj de la nova ekologio kaj de ekologia etiko (samkiel de ekologia politiko) estas la mediokrizo, kiu en realo ja estas krizo de la civilizita homo. La ekscensoj de la homa socio kiel t.n. civilizmaŝino koncerne ekspluatadon de la resursoj, elĉerpiĝon de la naturaj provizoj kaj poluciadon de la biosfero samkiel ties sekvojn fariĝis videblaj kaj

mezureblaj. Multaj homoj iompostiome kaj plikajpli ekkonas, ke la scienc-teknika revolucio ĉe superrega optimisma-antropocentra-ekonomisma homkoncepto degeneras al ilo de aroganta, senbrida kaj ekskluziva memkontentigo de la specio "homo sapiens sapiens" laŭ la moto de Erich Fromm : "Mi estas tio, kion mi havas kaj kion mi konsumas". La kronike ekspluatema interveno de la civilizo en la naturon kaŭzas ĉe kresko de la mondloĝantaro pliiĝon de maŝato kaj deficitaj rikoltoj, redukton de fekundaj grundoj, akriĝon de la klimatoj, fine malintegriĝon de tutaj naturaj reguligaj cikloj pere de poluciado kaj malpleniĝo de la tutmondaj genrezervujoj pro la formortado de bestoj kaj plantoj. Perceptado kaj komprenado de la biosfero kiel integra tutsistemo, de kies funkcia komplekseco plendependas ankaŭ la homa bonfarto, malaperas malantaŭ la senmezuraj postuloj de la homaro, kiu restigas nur tiom de la naturo, kiom hazarde eskapas prilaboradon kaj forkonsumadon. Tiel estos formortigitaj ĝis la jaro 2000 15 ĝis 20 procentoj de ĉiuj besto- kaj planto-specioj, t.e. ĉ. 2 milionoj.

Al la kaŭzoj de la naturdetruo apartenas :

- Homaj impulsoj kaj ecoj kiel materialismo, avido, senmezur-eco, postulema mentaleco, konsum- kaj prospero-orientiĝo, strebado al akirado, sukceso kaj potenco.
- La en la juda-krista tradicio ankranta antropocentrismo (homcentrigemo), la redukto de la biblia kaj eklezia mesaĝoj je la homo, t.e. neglekto de la konserva komisiono favore al la subiga ordono.
- Natursciencaj kaj teknikaj evoluoj kaj eltrovoj, industriigo.
- Ekonomia liberalismo kaj la kun ĝi ligataj principoj de konkurenco, profito kaj de ekonomia "kresko".
- Orientaj planceloj.
- Traktado de la naturoresursoj kiel "liberajn", senlime kaj senpage disponeblajn havaĵojn.
- Rapida kresko de la mondloĝantaro kun ties pliiĝaj postuloj pri la resursoj de la tero.

Aparte atentigendas jenaj faktoroj :

Unue la mediokrizo komprenendas sub la vidpunkto de la eksponenta t.n. ekonomia kresko. La altigo de la nacia produkto surbaze de eksponentaj kreskokvotoj post certa tempo kaŭzas kolapson de la sistemo. Ekonomia "kresko" sekvigas krom la ekologiaj damaĝoj ankaŭ pliiĝajn socialajn kostojn. Kreskanta parto de la nacia produkto servas por mildigo de

la kreskokaŭzitaj damaĝoj. Notendas ĉi-kuntekste, ke eksponenta kresko el nepartia biologia perspektivo estas negativaĵo; ĝi objekte ne estas entenata en la pensostrukturoj de la homo, kiu havas denaskan mankon de imagopovo pri geometriaj plimultiĝoj. La malsano kancero estas ekzemplo de videbla konkretiĝo de ĉi tiu "nenatura" kreskomodelo.

Due la nocio de racieca kaptilo, kiu origine devenas el la ekonomio kaj kiu celas tion, ke ekz. tiu, kiu malpurigas akvon, iam devos ankaŭ mem trinki ĉi tiun malpurigitan akvon, povas esti pliampleksigata al ĉiuj ideologioj kaj agadokonceptoj. Ekologia pensado ĉi-kuntekste signifas analizi tiujn konceptojn koncerne tiajn raciecajn kaptilojn.

Do, en la ekologio natur- kaj soci-sciencoj estas ligendaj, ĉar la mediokrizo devas esti venkata kaj ĉar pridemandas la rolo de la homo kaj de ŝiaj/liaj ekonomiaj, socialaj kaj politikaj sistemoj kiel parto de la "bikos".

Ne okupiĝante pri izolitaj unuopaj efikoprincipoj en la naturo, sed pri la funkcikoncerna tuteco de la naturinterrilataroj kaj la efikoj de homaj sistemoj sur la socion kaj la naturan medion kiel tutecan ekologian sistemon, ĝi ne plu estas speciala kampo de la biologio. Ekologio ne estas scienca specialdisciplino apud aliaj, sed maniero ekokupiĝi pri esplorado de naturinterrilataroj kaj de rilataroj inter homoj kaj naturo, kiun la diversaj natur- kaj soci-sciencoj devas alproprigi. La ekologio estas sinteza pontoscienco.

Decidige estas, ke la homo, detruante la naturon, detruas sin mem. Ŝi/li nun estas efikanta samtempe en ĉiujn ekosistemojn. Neniam antaŭe iu specio endanĝerigis sian propran pluekziston per pereigo de aliaj specioj kaj ties vivejoj. Neniam antaŭe iu specio kapablis plenekstermi pli ol dek fojojn sin mem kaj ĉiun alian vivon sur la Planedo. Kaj neniam antaŭe estis tiom konscia al iu specio ĝia situacio kiel "sindromo de muŝokaptilo": Ju pli da scio pri la minaca situacio estas amasigata kaj ju pli klara fariĝas la direkto de ebla savo, des pli multe ĉi tiu specio - NI! - baraktas en la tenaca kaĉo de siaj detruemaj malvirtoj kiel muŝoj en mortiga gluo. Devenpunktoj de la krizo estas intervenoj en la strukturojn kaj funkciojn de la tuta ekosfero kaj ties naturaj subsistemoj kiel portantoj de la surtera vivo. Nun la fokuso de la esploroj estas la vivopovo de ĉiuj vivantaj sistemoj, ĉe kio ĉiu interveno en ĉi tiun strukturon tra la ekologia reto povas retroefiki rekte aŭ nerekte sur la homan bonfarton.

La principo de moviĝo de ekosistemoj estas la reciproka efikado. La moderna biologio pri tio pliiĝe sin direktis atenteme al la analizado de biokemiaj cikloj, ties reguligaj mekanismoj kaj endanĝeriĝoj. Tiu ĉi alpaŝo pruviĝis fekunda ne nur koncerne "naturajn" ekosistemojn (herbejo, arbaro, lago ktp.), sed ankaŭ koncerne sociajn unuojn, kiuj unu al la alia kaj al siaj medioj diverse interrilatatas. Ankaŭ ĉi tiuj en si mem dividitaj unuoj - kutime politik-jure dividitaj populacioj - estas ligataj kun sia medio per interŝanĝaj procesoj, tiaj, kiajn ni konas el la tuta naturo (energifluoj, kemiaj procesoj, socialaj interagadoj ktp.), parte interplektataj per rilatoj, kiuj deiras de la aparta civiliza povo (kaj malpovo) de la homo (laboro, tekniko, scienco).

La nova scienco de homa ekologio analizas la rilatojn inter la homaj vivokomunumoj kaj la biologio. Ĝi direktiĝas al la loĝ-antara dinamiko, esploras la fluon de energio kaj de mineraloj kaj bestaj nutraĵoj en ekosistemoj kaj provas determini la kondiĉojn de longtempa stabileco de ekosistemoj. Ĉe tio estas aplikata nova kompreno de la sistemteorio, en kiu sistemoj estas komprenataj kiel identecoj, kiuj konserviĝas en kompleksa kaj variebla medio per stabiligo de interno/ekstero-diferenco. Priskribataj estas strukturoj kaj procesoj, kiuj ebligas postvivadon de unuo (sistemo) en kompleksa medio; la intereso do celas kondiĉojn de memkonserviĝo de (eko)sistemo en ĝia medio. Tiaj analizoj de sistem/medio-rilatoj kompreneble povas helpi per laŭeble plej frua taksado de la kompleksaj sekvoj de teknikaj novaĵoj limigi aŭ eviti malutilajn efikojn, ekz. endanĝerigon de la ozona tavolo en la atmosfero per uzado de disŝprucigaj gasoj. Ekosistema esplorado do povas servi al konservado de la naturo.

Tio ĉi fakte ne estas memkomprenebla. Tiom longe kiom sistemanalizo en la ekologio servas al mildigo de damaĝaj sekvoj de teknikaj evoluoj por la homa populacio cele samtempan principan konservadon de la ĝisnuna superrega kaj ekspluata karaktero de la traktado de la eksterhoma naturo, la danĝero pri kolapso de la ekosistemoj ne malgrandiĝas, sed nur estas pluprokrastita estonten.

Kontraste al tio radikala ekosistema esplorado devus deveni de tio, ke la homo mem estas parto de la naturo kaj kiel ununura vivestaĵo povas scii tion kaj voli ĝin. Sed esti laŭ propra volo parto de la naturo signifas la scion esti finhava kiel ĉiuj fenomenoj en la naturo, esti do mortideva. Kiu akceptas tiun

ĉi finitecon, tiu kapablas lasi la naturon libera sen ĉiam al-trudi al ĝi la propran volon, kiel ajn sistemanalizo klerigite. La kategoria imperativo de la ekosistema esplorado kaj de la traktado de la naturo tekstas tiukaze : "Agadu tiel, ke vi ĉiutempe traktas la naturon samtempe kiel celon kaj neniam kiel nuran rimedon."

Mondmodeloj estas sistemanalizaj grandprojektoj, kiuj estas establataj per komputoroj kaj (koncedite) la respektivaj premisoj. Ili ne legendas ekzakte laŭcifre, sed donas tendencojn kaj per tio orientigan helpon pri estontaj evoluoj. Elirpunkto estas la ekonomio, ke priskribeblas multaj evoluoj en la naturo aŭ en la socio per unue la nuntempa stato kaj due la nuntempaj ŝanĝiĝoj de tiu ĉi stato (levels and rates). Dependecoj en la senco de pozitivaj kaj negativaj retrokupladoj al iu statogrando ludas gravan rolon ĉe tio, samtempe la pritaksado de malakceliĝoj. Resume oni povas diri, ke "ĉiuj mondmodelaj eksperimentoj unusignife montras, ke la materialaj limoj de la mondo povas dilemigi la homon, se ŝi/li tro longe ilin ignoras aŭ ne adaptiĝas al ili ĝustatempe per sia agado. Do, homa agado ludas la centran rolon en la estonta evoluo.

F. Vester, germana biokemiisto kaj biofizikisto donis ok biokibernetikajn regulojn de postvivopovaj sistemoj. "Ĉi tiuj fundamentaj reguloj pruviĝis kadre de la evolucia strategio de la naturo kiel la internaj gvidaj grandoj de postvivopovaj sistemoj kaj subsistemoj. Ili pro tio propradire devas validi ankaŭ por la sistemo de la homa civilizacio - kiel parta sistemo de la biosfero - kaj pli facile povas garantiĝi ties postvivadon kaj evolukapablan formadon ol la stultaj premisoj de unutraka devigo al ekonomia kresko". La reguloj donas rektoŝnuron koncerne esploradojn kaj pritaksadon de ekologie gravaj problemoj fone de la pontosciencia karaktero de la ekologio. Jen la reguloj : 1. Negativa retrokuplado devas domini pozitivan retrokupladon (Pozitiva retrokuplado ekfunkciigas pere de memfortigo. Negativa retrokuplado post tio konservadas stabilecon kontraŭ perturboj kaj transpaŝoj de limvaloroj). "Reguligaj cikloj stabiligigas pere de negativa retrokuplado. Ĉi tiu memdirektigo en ciklaj procesoj aŭ inter limvaloroj estas la plej grava organiza principo de parta sistemo, se ĝi volas postvivi ene de tutsistemo. Ĉiu parta sistemo, kiu definitive renversiĝas en pozitivan retrokupladon (Circulus vitiosus) ritme intensiĝas aŭ supren aŭ malsupren, t.e. aŭ eksplodas aŭ malaperas." (Vester). 2. La sistemfunkcio devas esti sendependa de la

kresko (La trafluo de energio kaj materio estas daŭre konstanta. Tio malgrandigas la influon de ne-inversigeblaĵoj kaj la nekontroleblan transpaŝon de limvaloroj.) 3. La sistemo devas labori funkciante kaj ne produktocele (Respektiva interŝanĝebleco pligrandigas flekseblecon kaj adaptopovon. La sistemo postvivas ankaŭ ĉe ŝanĝitaj resursoj (=proponado). 4. Utiligo de la ekzistantaj fortoj laŭ la "jiu-jitsu"-principo anstataŭ batalado laŭ la boksa metodo (Fremdenenergio estas pli longe utiligata (energi-kaskadoj kaj -ĉenoj), dum la propra energio unuavice servas kiel direkta energio. Profitas jam ekzistantajn konstelaciojn, akcelas memreguladon). 5. Multobla utiligo de produktoj, funkcioj kaj organizaj strukturoj (Reduktas trafluan. Plialtigas la retiĝan gradon, malaltigas la investon de energio, materialo kaj informado). 6. Reciklado. Utiligo de cikloprocesoj cele de utiligo de defalaĵoj kaj kromvarmo (Devenaj kaj finaj produktoj egaligigas. Materialaj fluoj cirkuligigas. Mildigigas ne-inversigeblaĵoj kaj dependecoj). 7. Simbiozo. Reciproka utiligo de diverseco pere de kuplado kaj interŝanĝado (Favoradas malgrandspacajn procesojn kaj malgrandajn transportdistancojn. Malgrandigas trafluan kaj eksteran dependecon, grandigas internan dependecon. Malgrandigas konsumon.) 8. Biologia formkoncepto de produktoj, metodoj kaj organizado pere de retrokuplado kun la medio (Konsideremas endogenajn kaj ekzogenajn ritmojn. Utiligas resonancon kaj laŭfunkciajn adaptoformojn. Estigas organan integriĝon de novaj elementoj laŭ la ok fundamentaj reguloj).

## Resumo

Ekologio kiel pontoscienco estas la scienco pri la reciproka rilataro de la vivestaĵoj kaj naturfenomenoj, pri la vivkomunumoj kaj iliaj mediorilatoj kaj per tio ankaŭ de la agadmaniero de la homa socio ene de la naturmastrumado. Tasko kaj signifo de la ekologio konsistas en la elmontrado de la sekvoj, kiuj rezultas por la homaro el la intervenado de la civilizo en la naturmastrumon kaj prinomi la kaŭzojn de ĉi tiuj sekvoj aŭ intervenoj. Principe ekzistas du diversaj pozicioj koncerne la problemon de la mediokrizo : 1-e : La teknologio povas solvi la problemojn de troloĝateco kaj malpurigo kaj 2-e : Ne ekzistas nur teknika solvo de la loĝantara kaj malpuriga dilemo, necesas ankaŭ etikaj, leĝdonaj, politikaj kaj ekonomiaj limigoj. La ekologio defendas la pozicion, ke ambaŭ premisoj ĝustas, sed ĉiu por si ne estas bazo de politiko aŭ praktikaj paŝoj kaj iu sukceso. La dua premo devas esti akceptata, se

la unua devas esti realigata. En la klasika instrulibro "Bazaj Elementoj de Ekologio" de la usona ekologo Eugene P. Odum tekstas, konsiderante ĉion : "La postvivado de la homo en por ŝi/li digna medio dependas de tio, ĉu oni sukcesas atingi ekologian pensadon sur ĉiuj niveloj, ne nur en la naturscienca sfero, sed ankaŭ en la sociologio, ekonomio, la politikaj sciencoj, do, per malmultaj vortoj, en ĉiuj sferoj de la vivo."

Cele tion ĉi laboras psikobiologo Roger Sperry, nobelpremiito de 1981, dirante laŭsence : Ĉar la fizike kaj psike gvida funkcio de la konscio en la cerebro de la homo estas science pruvebla fakto, pli valoras per ĉiuj fortoj adekvatigi aŭ konformigi la konscion de la homo al la ekologiaj veroj ol nur terapii la damaĝojn, kiujn kaŭzas ekologie nediferenciganta homa cerebro.

(fino en venonta L!)

### LITERATURO

1. E.Guhde, Naturo kaj socio - enkonduko en ekologian pensadon kaj agadon, Esperanto-Centro Paderborn, 1985
  2. W. Gunther, Ekologia etiko - trajtoj kaj celoj, MONATO 6/85
  3. H. Gruhl, Ein Planet wird geplündert, Fisher 1975. 3. H. Gruhl, Das irdische Gleichgewicht, Erb, 1982. H. Gruhl, Glücklich werden die sein, Erb, 1984. H. Gruhl, Der atomare Selbstmord, Herbig, 1986
  7. H. Traube, Nach dem Super-GAU, Rowohlt, rororo aktuell 5921, 1986
  8. P.u.A. Ehrlich, Der lautlose Tod, Krüger, 1981
  9. J. Grün u.a., Global denken - vor Ort handeln, Dreisam, 1984
  10. L. Kolakowski, Der Mensch ohne Alternative, München 1961
  11. W. Mickel u.a., Politik und Gesellschaft, Hirschgraben, 1981
  12. H. Dreschler u.a., Gesellschaft und Staat, Signal, 1979
  12. Das neue Fischer Lexikon, 1981
  14. W. Fuchs u.a., Lexikon der Soziologie, Westdeutscher Verlag, 1978
  15. Plena Ilustrita Vortaro, SAT, 1981
  16. G. Michelsen u.a., Der Fischer Öko-Almanach, Fischer, 1981
  17. H.v. Dittfurth, So lasst uns denn ein Apfelbaumchen pflanzen, Rasen und Röhrig, 1985
  18. Eugene P. Odum, Grundlagen der Ökologie, Thieme, 1983
  19. N. Luhmann, Zweckbegriff und Systemrationalität, Tübingen, 1968
  20. A. Pieper, Ethik und Moral, Beck'sche Elementarbücher, 1985
  21. H. Jonas, Technik, Medizin und Ethik, Zur Praxis des Prinzips Verantwortung, Insel, 1985
  22. H. Daly, U.S. Economic Growth from 1976 to 1986; Prospects, Problems, and Patterns, Vol.5, The Steady State Economy, U.S. Government Printing Office, Washington, 1976
- (fino en venonta L!)



## NEDOGMAJ PENSOJ ANTAŬ LA NOVA JARMILO

Mi ne volas florojn sur mia tombo  
aŭ en iu ajn imaga paradizo,  
sed dum mia vivo  
kaj sur nia planedo.

Antaŭ la nova jarmilo, kiam homoj povas atingi la lunon kaj esplori aliajn planedojn, la homaro ankoraŭ ne kapablas vivi pace kaj feliĉe aŭ eĉ nur interkomprenigi.

Ni povas konstati, ke nia mondo staras je la bordo de memdetruigo, ke

- la respondeculoj pri nia nuna socia vivmaniero malŝparas la riĉaĵojn de nia Tero, devigas la homojn labori multe pli ol necese, disvastigas malamon sur la tuta mondo kaj polucigas senlime la naturon ;
- la socia kaj humana progreso lamas post la teknika progreso kun prokrasto de multaj jarcentoj ;
- tradiciaj konceptoj kiel nacio, armeo, religio, eklezio konservas ankoraŭ la saman signifon kaj valoron kiel en la Mezepoko ;
- la rabavida ekspluatado de nia tero kaj la senskrupula kreskanta polucigo de la naturo detruas senkompense niajn vivesencajn elementojn ;
- ne regas frateco, klereco, amo, vero kaj racio, sed kruelo, egoismo, obskurantismo, mensogo, trompo ;
- kvankam la virinoj konsistigas la duonon de la monda popolo, ili apenaŭ estas reprezentataj en decidpovaj institucioj ;
- la koncepto pri demokratio estas misuzata kaj bezonas novan supernacian difinon.

Tamen, ekologia konscio disvastigas sin kun kuraĝiga rapideco, malfermante novan savontan vojon, kaj humana, racia pensmaniero komencas akiri influon kaj esperigas nin atingi pli feliĉajn vivkondiĉojn.

Se oni rigardas la preskaŭ senĉesan fluon de ĉiam pli rapidaj



aŭtomobiloj sur la aŭtoŝoseoj ; se oni staras antaŭ nuklea centralo kaj aviadilportanta ŝipo ; se oni vidas kaj aŭdas defili kolonon da tankoj aŭ formacion da jetaviadiloj ; antaŭ tia terura monstro de koncentrita energio kaj danĝera detrukapablo, homoj ankoraŭ nature sentemaj povas trovi sian situacion komparebla al tiu de formikoj minacataj de elefanta piedo. Kaj ne eblas eskapi el tiu minaco, ĉar la Tero estas sfero kun limigita radiuso kaj ne posedas senliman surfacon, kiel pensis la unuaj ŝipnavigistoj.

Ne estas sana nia socio. Se lernejo brulas, la lernantoj ĝojas ; se fabriko disponigas maŝinojn, kiuj faciligas la laboron, laboristoj emas rifuzi aŭ eĉ detruiri ilin. Jen du ekzemploj de absurdaĵoj, de malracieco. Kiu kulpas pri tia paradoksa sinteno, kiu rifuzas pozitivan institucion kiel la lernejon kaj ne volas teknikan progreson ? Ne la infanoj kaj la laboristoj kulpas pri tio, sed la responsuloj, kiuj kreas kondiĉojn en la lernejo por malami ĝin kaj maldungas parton de la laboristoj anstataŭ redukti la laborhorojn.

La ega teknika progreso okazinta en nia jarcento ne kaŭzis antaŭen-evoluon en la pensmaniero de la plejmulto de la homaro. Multaj homoj en la industrie evoluintaj landoj mezuras la kvaliton de sia vivo per la potenco de la aŭtomobilo, kiun ili povas aĉeti. Ne gravas kiom da libereco ili devas oferi por tio, aŭ kiom da sklaveco ĝi kostas. En Usono, la sklaveco estis aboliciita en 1865, tamen ĝi ekzistas ankoraŭ ĉie - en pli-malpli latentaj formoj - ĉe multaj institucioj, en kiuj la vorto obei ludas gravan rolon : armeo, polico, dependa laborrilato k.a. Nur la dumviva sklaveco ne plu ekzistas, sed ni suferas ankoraŭ tempolimigitan sklavecon. Plej klara ekzemplo pri tio troviĝas en la armeoj - organizaĵoj principe antidemokrataj -, kie la soldato ne agas pro konvinkaj argumentoj sed pere de perforto aŭ minaco de perforto.

Multaj eklezioj ne plu havas armeojn, sed ili posedas grandan kapitalon krom dekoj da miloj da tre valoraj konstruaĵoj por propagandi siajn mezepokajn ideojn, kaj tiom da povo, ke eĉ agnostikuloj baptigas siajn infanojn pro timo al malavantaĝoj en ties socia kaj profesia dependeco. Ekzemplo de la granda influo de la eklezioj sur la ŝtata aparato troviĝas en la Federala Respubliko Germanio, kie la diversaj eklezioj postulas impostojn de la baptitaj civitanoj, pri kies enkasigo zorgas ĉiuj komercaj entreprenoj samkiel okazas por la ŝtataj impostoj. Tio signifas, ke la ŝtata administracio estas je la dispo-

de la ekleziaj organizoj.

La mezepoka idealo de viro "duon-monaĥo kaj duon-soldato" konservas ankoraŭ similan valoron ĉe multaj eklezioj, kiuj ne nur permesas sed eĉ postulas mortigi "malamikojn" je la nomo de la "vera" dio. Aliaj eklezioj toleras ĉiujn krimojn kondiĉe ke en la lasta minuto de sia vivo, la pekinto pentos pri siaj pekoj. Revolvero kaj krucifikso povas esti uzitaj samrajte ĝis mallonge antaŭ la morto ; nur tiam devas malaperi la revolvero. Stranga imago de dia justa, saĝa kaj ĉion observanta, kiu tamen disponigas paradizon ankaŭ al tiuj homoj kiel diktatoroj, torturistoj kaj aliaj krimuloj.

Surogato de religio estas la nova tendenco kredi je la ekzisto kaj eĉ vizito sur nia planedo de eksterteraj estaĵoj, kvankam ili ne estas pruveblaj en atingeblaj distancoj. Tamen, malmultaj homoj kredas, ke eblas starigi feliĉigajn vivkondiĉojn sur la Tero. Tiu ĉi ideo havas ankoraŭ multe malpli da adeptoj ol la vere utopia imago de vivo post la morto, de paradizo en la ĉielo, ie ajn inter rusaj kaj usonaj kosmonaŭtoj.

La sociaj revolucioj okazintaj en nia jarcento ne ŝanĝis ankoraŭ multe nian socion, ĉar ili ne estis ĝis nun fruktodonaj koncerne la humanan progreson. Tio, kion oni nomas reale ekzistanta socialismo, estas nur pseŭdosocialismo. Kio, se ne, estas tia ne imitinda politika sistemo kiu, anstataŭ forigi la ekspluatadon de l'homo per la homo, postulas de siaj laboristoj labori pli longe ol en kapitalismaj landoj ? Krome, vere socialisma lando ne bezonus reteni perforte siajn laboristojn, sed male tiuj el najbaraj landoj kapitalismaj enirus ĝin proprave.

Ambaŭ politikaj blokoj apenaŭ diferencas inter si koncerne la senkonsideron al la naturo, el kiu la homoj estas parto. Dum ĉe ĉiu science aŭ simple racie elpensita projekto oni unue devas plani la ne-damaĝan forigon de la rezultantaj rubaĵoj, tio ne okazas ofte ĉe la grandaj industrioj kiel ĥemiaj kaj nukleaj : ili ĵetas la rubaĵojn en la riverojn, en la maron, en la aeron, sub la teron,... aŭ eĉ ĉe la najbaron. Ne nur la nunaj loĝantoj de la mondo sed ankaŭ la venontaj generacioj suferos grandan damaĝon aŭ eĉ detruon de niaj vivelementoj. La specialan danĝeron de la nuklea industrio ni vidis klare okaze de la katastrofo de Ĉernobil, kiu certe ne estos escepto. El ĉiu Ĉernobil povas iĝi Hiroŝimo, kaj Ĉernobil estas ĉie.

Oni komprenas senpene, ke en epokoj en kiuj regis la kruda perforto, la fundamento de la povo estis la krueleco, la emo suferigi aliajn homojn. Malpli facile estas kompreni, kial nuntempe, en landoj, en kiuj la popolo havas iom da influo por elekti registarojn, ne regas frateco, amo kaj racio. La klarigo estas komplika kaj baziĝas en la primitiva pensmaniero, kiu ankoraŭ estas en la homaro : anstataŭ labori kun siaj homfratoj por profiti kune de la naturo sen detrui ĝin, homoj batalas unu kontraŭ la alia kaj agas senskrupule antaŭ naturo kaj estontaj generacioj. Kaj por venki pli facile la supozitajn fremdajn malamikojn, ili elektas ofte demagogan, malhonestan, fortan kaj kruelan gvidanton, sen pripensi, ke ili mem estos viktimoj de liaj negativaj kvalitoj. El la samaj kialoj, regantoj ne hezitas sin alianci kun krimuloj, ĉu oficiale kiel solduloj, ĉu kaŝitaj kiel sekretaj servoj. Ne malofte ni ekscias pri registaroj, kiuj pretendas esti demokrataj, sed uzas krimajn metodojn kaj pagas krimulojn por plenumi mortigojn. Kaj kiam oni malkovras la fiagon, anstataŭ kondamni la responsulojn, la regantoj protektas tiujn ĉi kaj opinias nest-malpurigantoj tiujn honestajn homojn, kiuj denunciis la fiagon. Ĉi-lastaj estas fakte nest-purigantoj.

El tia sinteno malbone povas naskiĝi imitindaj homaj modeloj por la junuloj ; male kaptas ĉiam pli da junaj mensoj la ideo de "neniu futuro". La konceptoj de vero, honesteco, frateco, kiujn la infanoj lernas en la lernejo, ne speguliĝas en la realo. Ekzemple ĉe la kristanoj, jam en la unuaj vivjaroj eniras la infanan menson la mensogo pri la kristnaskaj donacoj fare de maskitaj viroj. Sekvas la konkurbataloj : kiu estas la plej rapida, la plej forta, la plej ruza ? Tamen, kiu estas la plej helpema, la plej bonkora, la plej honesta, tio ŝajnas ne valori. Fremda sinteno por mi, ĉar mi preferus vivi kune kun helpemaj homoj ol inter ruzuloj, mensoguloj kaj perfortuloj. Tiurilate estas meditinda la sperto de eŭropa instruistino en latinamerika vilaĝo, kie ŝi vizitis lernejon kaj, por ekkoni la scinivelon de la infanoj, aranĝis konkuron en klaso. Grupo da lernantoj staris antaŭ la nigra tabulo kaj penis solvi taskon. "Tiu, kiu unue trovos la solvon, turnu sin kaj diru laŭte sian nomon" estis dirinta la instruistino antaŭ la komenco de l' ekzerco ; tamen multaj minutoj pasis kaj ĉiuj infanoj restis mutaj. La supozo, ke la tasko estis tro malfacila por la scinivelo de tiu klaso, montris sin falsa, ĉar la plejmulto estis solvinta la taskon. La gastiganta instruisto klarigis la enigmon: neniu infano volis anonci sin la unua, ĉar ili ne kutimiĝis

konkuri por la unua loko kaj ne emis aperi kiel la plej lerta. Eble ni povas lerni multe de kelkaj "ne-civilizitaj" popoloj. La unua paŝo estus ĉesi laŭdi rekordojn. Kian valoron havas por la homaro ekzemple la fakto, ke iu ajn viro saltas 1 cm pli alte ol ĉiuj aliaj ? Certe malpli ol planti arbon ! Tamen, la nomo de tiu rekordulo estas disvastigata televide tra la tuta mondo, dum la nomo de defendanto de arbaro kontraŭ polucio aŭ detruo povas facile eniri obskuran polican arkivon.

Jam dum la unuaj vivjaroj, la infanoj spertas kruelecon pere de la grandparte stultaj rakontoj. Perforto, mensogo, perfido, krimo, brutala suferigo, por la aŭtoroj facile konstrueblaj miksaĵoj de fantazio kaj realo, kiuj kreas konfuzon ĉe la infana cerbo ; reĝoj, princinoj, lakeoj, servutuloj, situacioj ankoraŭ el la mezepoko, tio karakterizas kutime la rakontojn kaj postlasas certe sian negativan influon ĉe la infanoj. Mankas kreaĵoj, nova racia kaj humana pensmaniero ; mankas ankaŭ humuro kiel produkto de krea inteligento kaj ne kiel malica troigo de la difektoj de senkulpaĵaj personoj.

Sed eĉ antaŭ ol naskiĝi, homoj povas esti viktimoj de nia kruela socio : ankaŭ perforte generita embrio devas evolui ĝis la stato de feto kaj bebo, eĉ kontraŭ la volo de ties patrino. La probableco, ke tiamaniere naskita homo estos malfeliĉa kaj kontribuos al la malfeliĉo de sia patrino, estas tre granda. Tamen, tio ne interesas la dogmulojn, kiuj pretendas defendi la ne-naskitan vivon, sed ne zorgas, por ke ĝi kaj ties patrino ne mortu pro malsato aŭ sufero.

Kaj ankaŭ je la fino de sia vivo la homoj spertas la kruelcon de niaj leĝoj kaj kutimoj : se nekuraĉebla malsanulino ne plu vere vivas, sed nur vegetas kaj suferas tiajn dolorojn, ke ŝi ne plu deziras vivi, neniu rajtas helpi ŝin fini sian suferon, eĉ se oni rekonas, ke pluvivi ne havas senco por ŝi nek por la socio, kaj signifas nur malutilon por ambaŭ. Ŝi devas vegeti ĝis la neelteneblaj/mortigos ŝin. /doloroj/

Ruza, forta, senskrupula bona oratoro havas plej multe da ŝancoj esti elektita por alta politika posteno. Krome, la kandidato devas esti preta rezigni normalan familian kaj komunan vivon. Tiuj estas la ĉefaj kriterioj, laŭ kiuj oni iĝas politikisto. Tiel longe kiel ekzistos tiaj postuloj, niaj politikaj gvidantoj restos plej ofte malfidindaj, kaj virinoj ne havos ŝancojn esti politikistinoj.

La ĝisnuna ĝenerala kompreno de la koncepto demokratio

ne plu estas sufiĉe vasta. Se ekzemple la britoj balotus pri la alternativo ĉu ĵeti britajn atomrubaĵojn en la maron antaŭ la hispana marbordo - kio estas reala okazo - aŭ male eviti ties produktadon, verŝajne la plejmulto voĉdonus por la unua propono kaj la brita registaro apogus sin sur tiu "demokrata" decido por plue polucii la maron.

En la etimologio de la vorto demokratio, la elemento popolo, kiam estas tuŝitaj ekologiaj aspektoj, ne plu povas esti limigita al unuopaj nacioj, sed devas enteni la tutan homaron. Kaj tiu postulo valoras ankaŭ por polucioj okazantaj interne de landlimoj, ĉar la naturo ne konas politikajn limojn, kaj radioaktivaj, ĥemiaj kaj biologiaj damaĝoj trapasas la artefaritajn naciajn teritoriojn.

Se ankoraŭ ne eblas starigi mondan registaron kaj enkonduki Esperanton tutmonde kiel duan lingvon, ni devas almenaŭ strebi al la kreo de supernacia kontrolinstanco por protekti la naturon ĉie en la mondo sen konsidero al landlimoj.

Ĝis la mondo atingos tian vere civilizitan staton, en kiu ne plu ekzistos landlimoj kaj naciaj armeoj ne plu necesos, povus ekzisti provizora fazo kun internacia armeo. Ĉiuokaze ni devas nepre ĉesigi la frenezan armegadon.

La homaro povos nomi sin prave civilizita, kiam anstataŭ senlaboraj instruistoj kaj kuracistoj, estos senlaboraj militistoj kaj policistoj, kaj kiam oni enmetos maŝinojn en la laborprocesojn por redukti la labortempon de la laboristoj kaj ne por maldungi ilin.

#### Justo

La aŭtoro deziras resti anonima. Krome, li opinias, ke la nomo de la verkinto estas malpli grava ol la enhavo de la teksto.

#### ESPERANTO-STRATO \* ALVOKO

En lasta somero la urbaj instancoj de la Bordoza antaŭurbo CENON (Francio) decidis baptnomi novan straton per la nomo ESPERANTO. La loka E-klubo planas organizi publikan inaŭguran ceremonion kunlabore kun la urba estrarano. Aparte bonvenaj estos gratulkartoj, kiujn ni tiam transdonos al la urbestro. Tiucele bonvolu sendi ilin al jena adreso: Urba Konsilantaro - ĉe ROBERT Léo, 11 rue des Frères Lumière, F 33150 CENON.

VALO :



Vortoj de

Maljunulo

Erotiko  
(pruduloj sin detenu)

Laŭmoda temo, kiun mi povas sobre kaj serene pritrakti, nun kiam, jam longe, la kvietiĝo de la sensoj forpelis de mi ardon kaj pasion.

En "La Klasika Periodo" ni legas versojn de La Fontaine jene tradukitajn de Waringhien :

Volupto kaj Deziroj estas  
Por homo plej ŝatinda raro,  
Sed, disigite, tiu paro  
Ne plu plezure nin molestas.  
El kaco, piĉ' kaj koroj du  
Akord' naskiĝas - plena ĝu',  
Kiun bigotoj damnas stulte.  
Amarilisa, aŭdu vi, ho!  
Ami sen fik' estas nemulte,  
Fiki sen am' estas nenio.

Ŝajnas al mi, ke Lafonteno iom tro simpligis la demandon. Inter viro kaj virino estas ja pli ol du specoj de rilatoj.

"Fiko sen am'", tion viroj konsumas kun publikulinoj (kiujn mi respektas kaj neniel malestimas : ili estas senartifikaj personoj, kiuj honeste faras sian metion). Iuj asimilas tion al onanismo, dirante : tiuj viroj sin masturbas per virina korpo. La komparo ne estas tute ĝusta, ĉar la kontakto kun korpo aliseksa, aŭ, por iuj, samseksa, aldonas plian sensplezurdimension al la pura seksorgana volupto.

Ĉe la alia ekstremo mi vidas almenaŭ kvar diversajn formojn, nome :

- flirtado, amindumado, kiu iafoje estas nur komenco, kaj aliafoje restas sensekva kaj senkonsekvencia.
- pura amikeco sen seksa distingo : ĝi estas rara kaj bela.
- ama amikeco, en kiu partoprenas ofte reciproka deziro, sen efektivigo : agrabla, danĝera, fragila ekvilibro, kiu ofte falas

en amoron.

- "Amo sen fik", ĉasta amo, ne stabila, kiu enhavas la saman danĝeron.

Inter tiuj du ekstremoj situas jenaj formoj :

- tio, kion mi nomos "amora amikeco", t.e. amikeco plus amoro : tre agrabla kaj senproblema, krom ofte la neceso sin kaŝi de ŝia edzo kaj de lia edzino - komplikoj kaŭzitaj de alies ĵaluzo, sed sendependaj de la geamika paro. Mi ĝin komparas al miksaĵo de kemiaj elementoj, el kiuj ĉiu konservas siajn proprajn karakterojn kaj ilin miksas : kafo kun sukero. Iafoje sufiĉas sparko por fari el tiu miksaĵo kombinon, t.e. tute nova substanco kun apartaj proprecoj : ekz-e miksaĵo de hidrogeno kaj oksigeno, kiun elektra sparko subite bruligas kaj transformas en akvon. El la amora amikeco tia sparko povas iafoje fari plenan amon.

- Fine, tiu plena amo, en kiu partoprenas la sensoj (ĉiuj sensoj, inkluzive sed ne ekskluzive la seksa), la kapo (cerbo) kaj la "koro" (t.e. fakte, parto el la cerbo).

Tio ĉi estas la "akordo, plena ĝu" difinita de nia poeto, kiu certe ĝin spertis mem.

Lafonteno iom troigis, dirante : "Fiki sen am' estas nenio", sed vere estas, ke nur en la plena amo (kaj en la amora amikeco) la volupto atingas sian kulminon.

Junaj amikoj, sentime fiku, sed, kiom eble, prefere kun amo, aŭ almenaŭ kun amikeco.

"Ni iru renkonte al vivo"

(Franca kanto el la tempo de la Popolfronto  
kaj de la unuaj laboristaj ferioj, 1936)

- Kiel vi fartas ?

- Kiel maljunulo.

T.e. : kun naturaj kriplaĵoj ligitaj al la maljuneco.

Koncerne min, miaj kvar membroj estas ankoraŭ sufiĉe bonstataj. Mi povas plu marŝi, grimpi, naĝi, sed mi devis rezigni pri kurado, saltado, samkiel pri amorado. Mi rezignis ankaŭ pri aŭto-stirado, pro la malbona kvalito de mia vid- kaj aŭdkapablo. Nu, mi ne intencas tedi vin per plendoj kaj peti kompaton pri miaj personaj malagrablaĵoj. Mi volas nur ĉerpi el mia sperto por min turni al junaj laboristoj.

Junaj geamikoj, iru renkonte al la vivo : ĝi povas esti por vi bona kaj bela. Plejeble ĝuu viajn libertempojn. Ekskursu kaj

vojaĝu, somere naĝu en maro aŭ riveroj, vintre skiu sur monta neĝo. Kantu kun la studentoj : "Ĝoju ni, dum ni junaj estas!" Renkontu diverslandajn gekamaradojn; en kontakto kun ili akiru pli vastan ĉirkaŭvidon, kaj pli riĉan kulturon : kulturo ne estu privilegio de burĝoj.

Al malpli junaj, proksimaj al la sesdeka jaro, mi konsilas : ne prokrastu la tempon de emeritiĝo. Forlasu sufiĉe frue la sklavecon de la ĉiutagaj laborhoroj. Antaŭ vi restas ankoraŭ kelkaj jaroj por libera vivo. Se eble, vojaĝu, vizitu vian patruon, la mondon, konatiĝu kun viaj fratoj, la homoj. Ne fuŝu la restantajn tagojn de la libereco. Vigle ĉirkaŭprenu ĝin en viaj ankoraŭ fortikaj brakoj, kaj vivu. La jaroj kuras pli rapide ol ni, pli kaj pli rapide. Tro frue venos la tempo de vegetado en soleco. Ĝis la antaŭfina kadukiĝo, restas al vi uzinda tempo : ekkaptu ĝin, kaj vivu!

Kio interesas la homojn ?

Sur la teritorio de la vilaĝo komunumo Les Boudous, proksima de Florako je kelkaj kilometroj, geologoj eltrovis uranian ercon. Uranio, la krudmaterio por atombomboj kaj atomcentraloj. Tuj interesiĝis oficialaj instancoj, kaj kapitalistoj, flarante profitdonan aferon, ekprojektis minon por elĉerpi kaj ekspluati la danĝeran materion.

Nelonge poste lokaj ekologiistoj fondis defendkomitaton por protesti kaj eventuale agi kontraŭ tiu iniciato. Sur ĉiuj foiroj de la regiono ili prezentas standon kun broŝuroj, flugfolioj, diagramoj, peticioj. La plimultaj pasantoj distre rigardas kaj indiferece preteriras.

La projekto promesas dungon kaj salajron por kelkaj malriĉaj kamparanoj. Kompreneble ĝi silentas pri la detruo de kultiveblaj grundoj, la fuŝo de bela natura pejzaĝo kaj la endanĝerigo de la sano de la loĝantoj kaj de ilia idaro. Ĉion ĉi, kun bonaj argumentoj denuncas la komitato, sed kiu atentigas ĝiajn argumentojn? Ha! se temus pri sporto, festo, spektaklo... Sed pri seriozaj, gravaj demandoj, kiu estas interesata?

Kongresaj nostalgioj

En aŭgusto kiel ĉiujare mi ricevis du poŝtkartojn kun pluraj subskriboj : unu el Varsovio, unu el Bulonjo-ĉe-Marzo. Varsovio, Bulonjo : prestiĝaj nomoj en la historio de nia movado !

Kiam okazis la unua kongreso en Bulonjo mi estis kvinjara knabo, kaj ankoraŭ ne aŭdis pri lingvo internacia. Naŭ jarojn poste mi deziregis kaj esperis partopreni en la Deko en Parizo.

Ĝi ne okazis, krom la solena malferma kunsido, en kiu Gabriel Chavet, memorinde eivokis la "ĉiam, malgraŭ ĉio vivantan internan ideon". Cetere, en tiu sama tago, 2a de aŭgusto 1914, mi kuŝis sur mia lito kun akuta bronkito kaj febro, kaj ne povis veturi al Parizo.

Mi devis atendi ĝis 1932 por ĉeesti kongreson de UEA en Parizo, en kiu mi aktive partoprenis kiel parizano kaj membro de la komitato de la parizregiona federacio de SFPE (Societo franca por la propagando de esperanto). Kaj en 1935, ankaŭ en Parizo, la kongreson de SAT, en kiu lastafoje, en la lasta kunveno, apenaŭ aperis Lanti, ĉar li ne volis influi la debatojn per sia forta personeco. Poste mi ankoraŭ ĉeestis kongreson de UEA en Marsejlo, kie mi renkontis Caubel kaj profesoron Canuto, kaj maltrafis Raymond Schwartz, kaj kongreson de SAT en Narbono, bone organizitan de Loubic kaj la loka OKK, en kiu mi renkontis, inter aliaj, Piron kaj Glodino.

Ĉi-jare, sur la karto el la 60a kongreso de SAT mankas la kutima subskribo de Glodino.

Mi saŭdade elvokas tiujn belajn kongresojn, kaj la memoron pri la samideanoj, kamaradoj kaj amikoj, kiujn mi tie renkontis, kaj neniam plu renkontos. Longa estus la listo, se mi volus ĉiujn nomi, de Ozre kaj Bubo ĝis Bannier kaj Glodino. Al mia fidela memoro aperas ankaŭ kelkaj ankoraŭ vivantaj, kiujn mi probable neniam revidos, ĉar mi preskaŭ ne plu vojaĝas, ĝis miavice... Eble mi vivos ankoraŭ kelkajn jarojn, en kiuj okazos kongresoj, kiujn mi ne vizitos. Sed mi esperas, ke ili estos vizitataj de pli kaj pli junaj kaj fervoraj esperantistoj.

VALO

\*\*\*\*\*

### LAU ZIGZAGOJ DE LA ĜENERALA LINIO

Ĉiu, kiu almenaŭ iomete studis historion de SAT, scias kiom akraj bataloj okazadis en ĝi pro zigzagaj turnoj de bolŝevika politiko (vidu : E.Borsboom "Vivo de Lanti"). Kiel, kial okazadis ĉi tiuj zigzagoj? La aŭtoro de ĉi-sekva proponata humura rakonto vivis ĉion interne, en Sovetio, kaj li majstre priskribis teknikon de ŝanĝoj, interalie, rehonorigon (dum la 30aj jaroj) de ĉio rusa. Pasis pli ol 50 jaroj ekde la priskribitaj okazintaĵoj. Ĉiu, kiu vizitas Sovetion nun, ne povas ne rimarki grandegan kulton de la rusa caro Petro la Granda (remeti sur "historiajn piedestalojn" princon Andreo Bogoljubskij kaj caron Ivano la Terura oni ne multe sukcesis, sed pri Petro la Granda sukceso estas eksterordinara). Ĉiu, kiu tiel aŭ aliel laboradis-militadis

por pligrandigi la Rusian imperion ne plu estas konsiderata kiel koloniisto, sed kiel "portanto de progreso kaj civilizo" al koloniigitaj popoloj. Kaj ĉiu, kiu kuraĝas kontraŭstari la oficialajn sovetiajn tezojn, ĉu vi divenas kiel li nomiĝas? - "burĝa ukraina (belorusa, litova, latva, estona, armena, uzbeka, kazaha k.a.) naciisto" !

Dumtempe la ĝenerala linio de KPSU\* daŭre zigzagadas.

### A. Visoĉenko

### PELTO DE PRINCO URUSOV

Lev Markoviĉ havis esceptan kapablon flari la politikan aeron. En Kievo neniu pli bone ol li scipovis tiom ĝustatempe kaj korekte postiri paŝojn de Stalin laŭ kurbigoj kaj fleksigoj de ĝenerala linio. Al ĉiu, kiu konis proksime ĉi tiun personon, ŝajnis, ke li ĉiam staras ie apud la unua Kremlo kaj atente observas kien tiu direktos sian laŭvican paŝon. Kaj ekvidinte ĝin, li tuj senerare sekvas.

Tamen, imago estas imago, kaj realeco - realeco. Respondeca sekretario de Kieva filio de RATAU (Radia-Telegrafa Agentejo de Ukrainio) Lev Markoviĉ Rabinoviĉ, malgraŭ sia malproksimeco de bolŝevika ĉefstabejo, orientiĝis pri eventoj multe pli bone ol multaj grandaj moskvaj aŭ ĥarkovaj partiaj gvidantoj. Neniam li forturniĝis dekstren aŭ maldekstren, neniam trafis inter oportunistojn, kaj, ĝenerale, ĉiam sukcese ĉirkaŭradis diversajn opoziciulojn.

Ĝuste pro tio ke li estis brila majstro flari la politikan aeron, li jam dek jarojn okupis la saman postenon en RATAU, kiu ĝin plene kontentigis. Kiom da sekretarioj de kievaj partiaj komitatoj, kiom da eminentaj personoj en Ĥarkovo kaj Moskvo estis forbalaitaj dum ĉi tiuj jaroj! Nemal multe da direktoroj ŝanĝiĝis ankaŭ en Kieva filio de RATAU, nur ĝia respondeca sekretario Lev Markoviĉ Rabinoviĉ ĉiam restadis surloke, per nenio kaj neniu frapita.

Kvankam formale li ne apartenis al la komunista organizaĵo, konfidon li havis grandegan. Sen lia subskribo neniu bulteno aŭ oficiala papero povis forlasi la Filion, sed sen subskribo de laŭvica direktoro - kiom da vi volas. Renkontante lin, influaj partiaj agantoj aŭ kunlaborantoj de Centra oficejo de RATAU, kiu troviĝis tiam en Ĥarkovo, kutime demandadis: - Nu, kiel plaĉas al vi via nova direktoro ?

Lev Markoviĉ nedefinite grimacis kaj evite respondadis :

- Mi ankoraŭ ne scias, dume pririgardas lin.

Ĉar direktoro, kiel vi komprenis, ĉiam estis nova. La respondeca sekretario, nur pere de li konataj vojoj, al neniuj nova direktoro permesis pli profunde ekkonatiĝi kun informa kuirejo. Nur-nur laŭvica novico komencadis meti sian manon sur aferojn, sed oni jam forsendas lin aliloken.

Kaj temis ja pri aferoj tre gravaj. El vivo de Kievio oni ĉerpis informojn por la tuta sovetia gazetaro. Ĉi tio estis oficiala, pli ĝuste - de dekstre videbla, agado de RATAU. Sed alia, por vasta publiko nekonata, la afero estis tia : oni aparte preparadis specialajn bultenojn por lokaj sovetaj kaj partiaj instancoj, NKVD<sup>2</sup>, kelkfoje por CK de KP(b)U<sup>3</sup>, aŭ eĉ por CK de VKP(b)<sup>4</sup> en Moskvo. En tiuj bultenoj-sciigoj ĉio havis konfidencan karakteron : malsato dum kolektivigo, humorstato de loĝantaro, diversaj negativaj faktoj el vivo de diversaj institucioj, organizaĵoj, apartaj personoj...

Disvastigita, nemalbone pagata reto de kunlaborantoj, sekvante ordonojn de la respondeca sekretario, akiradis ĉiajn faktojn en necesa kvanto.

Tutcerte, ne nur unu larĝa ŝultro en sovetia ŝtato estis interesigita gardi Lev Markoviĉ sur ĝenerala linio. Pro tio en Kieva filio de RATAU li sentis sin plenrajta mastro. Tute ne vane kompetentaj personoj ofte diradis : institucio de kamarado Rabinoviĉ.

\* \*  
\* \*

Fino de la 1933a jaro. Neĝaj pecegoj atingas larĝajn fenestrojn de malgranda domo krucstrate Funduklijivska-Gimnazia. Sed ene regas varmo : oni varmigas fornojn en kelkaj ĉambroj kaj eliranta fumaĉo forpeliĝas per freŝa aero el malfermitaj ventolgiĉetoj. Granda ejo estas dense dividita per maldikaj lignoladaj muroj, kiuj, tamen, ne atingas komunan plafonon. Tial ĉio, kio eldiriĝas aŭ fariĝas en la unua ĉambro, aŭdiĝas ankaŭ en la lasta.

Lev Markoviĉ, sidante en sia kabineto, eĉ ne tro streĉante atenton, bonege scias kiu el liaj kunlaborantoj rakontas ĉi-momente anekdotojn, kiu tajpas, kiu parolas per telefono. Kiam lian oreton atingas io interesa, li krias el sia sidloko :

- Hej, ĉi, iru ĉi tien, rakontu al mi cian novaĵon!

Li ĉias ĉiujn, same oni ĉias lin. Estas interese, ke en Kieva filio de RATAU neniuj uzas devigan vorton "kamarado" kun sekva familinoma aldono. Ĉiuj nomas unu la alian per antaŭnomo kaj patronomo, aŭ eĉ nur per unusola antaŭnomo. Ankaŭ Rabinoviĉ ne faras escepton kaj volonte respondas je vorto

"Ljova"<sup>5</sup>.

Alikaze similan institucion "pro familiareco" oni jam de longe forrazus de kapo ĝis piedoj, sed ĉi tien neniuj kuraĝas enmiksiĝi.

Hodiaŭ laboro glitas el manoj de Lev Markoviĉ. Jen li prenas telefonaŭskultilon kaj demandadas pri kialoj de malfruo de Moskva trajno, jen li telefonas hejmen kaj petas edzinon esti preta por io. Jen subite, en bela festokostumo, li rapide trakuras ĉiujn ĉambrojn, lasante post si odoron de multekosta parfumo.

En sia sekretaria kabineto li laŭte frapadas per fingre sian tablon, eligante per nazo strangan sonon, similan je konsento pri io. Liaj oreloj kaptas susuradon de tajpistino malantaŭ lignolada barilo :

- Nia Ljova el Mogiljovo<sup>6</sup> havas hodiaŭ bonegan humoron.

- Tute ĝuste, ĉi divenis, - deziras respondi li, sed sin detenas. Kaj post momento li ekpensiĝas.

Jam de kelkaj monatoj li, Rabinoviĉ, ne povas kompreni kien komencis direktiĝi la ĝenerala linio de la partio!

En Ĥarkovo sonoregis sinmortigaj pafoj de Ĥviljovij<sup>7</sup> kaj Skripnik<sup>8</sup>, kaj lia kapo ekdoloris. Rigardante supraĵe, tio estas mistero, ja kio povus lin ligi kun tiuj personoj, ĝenerale, kion komunan li havas kun burĝa ukraina naciismo, kiun oni nun kruele kontraŭbatas ?

Sed Lev Markoviĉ ŝatas ĉie vidi ordon, eĉ en ĝenerala linio. Iam estis aparte honorata internaciismo, li ĝin bone komprenis kaj montris sin kiel grandan kosmopoliton - civitanon de la tuta mondo. Poste venis epoko de ukrainigo<sup>9</sup>. Bonvolu - li perfekte posedas la ukrainan lingvon, kaj ĝenerale, vivu la kulturo nacia forme kaj socialisma enhance!

Sed kio okazas nun? Oni senkompatate persekutas burĝajn ukrainajn, belorusajn, uzbekajn, kartvelajn naciistojn, sed neniuj donas novajn programajn direktivojn, neniuj diras kio venos poste. Rabinoviĉ jam pensis pri reiro al antaŭa, tutmondeca politiklinio, tamen lia bonega nazo ne sentis konfirmigan venton. La situacio estis tute neklara, do, la plej malbona, kiun nur eblas imagi. Tiakaze oni devas esti preta por ĉio.

Tamen li ne kutimis sidi en embuskejo, nenion farante kaj atendante sekvojn. Do, ankaŭ en ĉi tiu situacio Lev Markoviĉ, kiel li scipovis, agis tre singardeme. Parolante per telefone pri oficaj aferoj kun Ĥarkovo aŭ Moskvo, la respondeca sekretario de RATAU, kvazaŭ pretere, demandadis pri sanstato de tiu aŭ alia persono, transdonadis salutojn, alude petadis ne forgesi pri Kievio.

Respondecaj personoj, antikvaj amikoj de Rabinoviĉ, devis el ĉi tiuj kurtaj aludoj kompreni kion li deziras. Sed ili ial longe ne respondas, kaj, ĝenerale, kondukas tiel, kiel oni kantas en konata sovetia kanto :

- Kaj kiu ja scias  
Pri kio li aludas...

Skribi leteron - ho, ne, li ne estas stultulo, sincera letero en belega patrujo de socialismo ĉiam povas iĝi akuzdokumento kontraŭ ĝia aŭtoro.

Subita akra telefonsono interrompas lian pensadon. Lev Markoviĉ haste kaptas la telefonaŭskultilon kaj ĝoje ekkrias :  
- Miŝa! Saluton, karulo! Ege mi ĝojas pri via alveno! La telegramo alvenis ĝustatempe! Mi kuras renkonten! Taksio atendas apud pordo de RATAU!

Lev Markoviĉ ventosimile forlasas sian lokon, kriante:  
- Hej, vi, kunlaborantaro! Atendu kiom bezonatos! Venis tiu, kiun ni plej bezonas!

Frapis elirpordoj, kunlaborantoj de RATAU restis en ĝoja ekscitiĝo.

- Prepariĝu renkonti grandan personon! - aŭdiĝis voĉo de vigla tajpistino malantaŭ lignolada barilo.

\* \*  
\* \*

Forpasis proksimume tri horoj. Frua vintra vespero tra larĝaj fenestroj enrampis ejon de RATAU. Ekbrilis elektrolampoj. Subite larĝe malfermiĝis enirpordoj, enlasante tra si torenton de freŝiganta frosta aero kaj viglan brueman triopon. Al ĝi rapide alkuris anstataŭanto de direktoro Abraŝa<sup>10</sup> Litvak, pli konata en Kievo sub nomo Kurba Lipo. Lia dekstra buŝparto prezentis el si rondan truon, samgrandan kiel kvinkopeka monero.

- A, Sofja Lvovna, mian adorkliniĝon! - laŭte alparolas Abraŝa Litvak belan, altan sinjorinon en eleganta blukolora pelto.

Ŝi, ne forprenante gantojn, pikas perfingre la ventron de la direktora anstataŭanto kaj ŝerce eldiras :

- Kun tia havaĵo vi eĉ ne kapablus kliniĝi. Mi dezirus vidi, kiel vi elturniĝas, se vi devas kisi virinon?

Laŭta rido de ĉiuj kunlaborantoj sekvas la lastajn vortojn de Sofja Lvovna. Konfuzita Abraŝa Litvak senhelpe penas kovri permane sian ĵuskritikitan rondan ventregon.

- Sonjo, vi malhelpas al kamarado Litvak saluti nian karan gaston, mildvoĉe diras Lev Markoviĉ al sia edzino.

Nun ĉiuj kunlaborantoj de RATAU turnis sian atenton al

homo mute staranta inter geedzoj Rabinoviĉ. La direktora anstataŭanto haste alkuris lin.

La homo similis turon. Lia alta staturo de kolo ĝis kalkanumoj estis kovrita per longa kaj larĝa pelto. Kolumfelo falis ĝis ŝultroj kaj poste per du dikaj rubandoj fluis preter butonoj malsupren. Kiam la alveninto debutonumis sian pelton, ĉiuj ekvidis... urson, tiom multe da densa felo enhavis ĝi.

Kiel oni povas diveni, ĉiuj kunlaborantoj de RATAU turnis sian atenton ne al la gasto, sed al lia pelto. Ja ĝi, en pli ol modestaj sovetiaj kondiĉoj, aspektis Dio scias kio. La gasto rimarkis ĉi tion kaj kontente ridetis, konsiderante ke li atingis sian celon. Litvak finfine rigardis lian vizaĝon kaj altvoĉe ek-kriis :

- Ho, Miĥajlo, salutata estu!

Ĉi-momente ĉies okuloj forlasis la pelton kaj ekkonis la gaston.

- Kamarado Verĥohljad! Kia surprizo! Ni salutas vin en prapatra Kievo! - ekaŭdiĝis el ĉiuj anguloj.

Lev Markoviĉ invitis la gaston al sia vasta sekretaria kabineto. Post momento ĝi pleniĝis de homoj.

Kvankam en la ejo tute ne estis froste, la alta gasto ne forprenis sian varman pelton. Li nur pli larĝe disigis baskojn, por ke ĉiu ĉeestanto povu pli bone pristudi la pelton. Kaj, ekfuminte cigaredon, li malrapide eldiris :

- Ekde kiam mi venis el Kievo Moskvon, mi ne plu nomiĝas Verĥohljad. Mi trovis por mi belan rusan familinomon Verĥovcev...

- Do, estas vi, kiu verkas en "Pravda" pri diversaj lokoj de Sovetio? - interesiĝis Rabinoviĉ.

- Mi laboras en la ĉeforgano de la partio kiel raportisto, krom tio mi estas ĉefo de loka sindikata komitato kaj ĉefredaktoro de porĵurnalista bulteno "Pravdano".

- O, vi kreas altan politikon en Moskvo! - rimarkis Litvak.

- Ĝin kreas Stalin, kaj ni, Pravdanoj, nur enradikigas ĝin ĉie kaj ĉien.

Mencio de Stalin-nomo iom premegis la viklecon de kunparolantoj. Ekestis malagrabra silento. Sofja Lvovna decidis turni parolon alidirekten.

- Kaj via pelto estas el vera kastora felo.

La moskva grandulo afable respondis :

- Vi divenis, ĝi estas el la plej bona kastorfelo de mondfama rusa manufakturo de Sava Morozov.<sup>11</sup>

- Antikvaĵo, kaj tiom bone konserviĝis.

- Ĉio rusa, Sofja Lvovna, konserviĝas eterne, ĉar ĝi ĉiam havas la plej altan kvaliton.

- Ha, ekzemple, Rjazanaj<sup>12</sup> bastoŝuoj<sup>13</sup> estas ekster ĉia konkurenco.

- Ne ŝercu, Sofja Lvovna, temas pri grava, ŝtata afero.

Nun plu neniŭ preteratentis laŭdadojn de ĉio rusa, kiujn faris reprezentanto de "Pravda". Kaj li, evidente, ne ŝetis vortojn vane.

Lev Markoviĉ, duonferminte okulojn, kvazaŭ interalie rimarkigis :

- Ni tagmanĝis kune kaj multon preparolis, sed nur nun, mi vidadas, vi komencas eldiri la plej interesan.

- Kion vi opinias la plej interesa? - rapide demandis la gasto.

- Nu, familinoma ŝanĝo, nekutima pelto...

- Bonege rimarkis, mi gratulas pro inteligenteco. Mi, cetere, havis nenian dubojn, ke en la Kieva filio de RATAU oni rapide komprenos novan direktiĝon de la ĝenerala linio de la partio.

- Ni volonte akceptas donace vian pelton.

Pri ĉi tiu ŝerco de Litvak ĉiuj laŭte ekridis, sed la Moskva veninto ekhavis ankoraŭ pli seriozan aspekton kaj daŭrigis :

- Mi restigos ĝin al vi kiel ideon...

- Domaĝe, ke ne kiel aĵon... - ne cedis la direktora anstataŭanto.

- Ĉesu ŝerci, ni ne estas infanoj. Ĉu ne tiel, Lev Markoviĉ? - turnis sin Verĥovcev al Rabinoviĉ.

Tiu tuj konsentis kaj alvokis siajn kunlaborantojn pli atente aŭskulti direktivojn de la respondeca aganto el centro de Sovetio. La lasta, sen superflujaj vortoj, rapide skizis la nunan situacion.

- La monda revolucio devas ankoraŭ atendi. La proletaro de okcidentaj landoj ankoraŭ ne maturiĝis por kompreni ideojn de komunismo. Tial nian internacian direkton ni metas flanken. Ni devas honori tiun popolon, danke al kiu venkis kaj nun ekzistas nia reĝimo. Ĉi tiu popolo estas la rusa popolo. Al ĝi kaj nur al ĝi devas aparteni la unua loko en ĉio...

- Nun mi komprenas kial vi ŝanĝis vian familinomon, - elvoĉigis Sofja Lvovna.

- Tre bone, ni daŭrigu. La rusa popolo fieras pri sia historio, siaj tradicioj. Ĉion ĉi ni, komunistoj, laŭ ordono de kamarado Stalin, transprenas al ni.

- Sed kiel esti kun rusaj princoj kaj caroj? - ne eltenis Rabinoviĉ.

- Al pli bonaj el ili : Andreo Bogoljubskij<sup>14</sup>, Ivan la Terura<sup>15</sup>, Petro la Unua<sup>16</sup>, ni kreos ankoraŭ neviditan kulton de tutpopola

adorado. Reen, sur historiajn piedestalojn ni revenigos ĉiujn famajn nomojn de Rusio.

- Interese, - lante eldiris Litvak.

- Certe! - tranĉis la Pravdano kaj eksilentis.

La ĉeestantoj muelis en siaj kapojn la aŭditajn moskvajn novaĵojn. Ĉiu el ili jam silente ellaboradis planojn de siaj sekvaj paŝoj konformaj al ŝanĝo de la ĝenerala linio.

- Sed kia politiko estos aplikata por alia, nerusaj nacioj de USSR? - post minuta pripensado decidis ekscii Rabinoviĉ.

- Sama, kiu aplikis la fama guberniestro de Besarabio<sup>17</sup> princo Urusov. Ĉiu, kiu falis sub potencon de rusa armilo, devis iĝi "rusa homo"...

- Jen kio... - Rabinoviĉ, streĉinte sian memoron, rememoris kiel rusa armeo kaj polico kruele devigadis besarabanojn obei kliniĝi antaŭ "panjo Moskvo". Verĥovcev, atente observante lin, fine interrompis la silenton :

- Ĉu vi ĉion komprenis, meritplena veterano de bolŝevika gazetaro? Ĉu vi nun scias kiun direkton vi devas doni al la tuta ideologia laboro?

- Mi dankas pri valora instruo, ĝi ne restos senrezulta.

La gasto malrapide ekstaris kaj komencis butonumi sian pezan vestaĵon.

- Sed pri la pelto vi forgesis rakonti, - rekonsciiĝis Sofja Lvovna.

Verĥovcev, videble kontenta pri la rememorigo, karesis permane la kastoran felon, kvazaŭ ĝi ne estus morta materialo, sed vivanta ĉarma kato.

- Vi eraras, mi tute ne forgesis, ja ĝi havas rektan rilaton kun nia interparolo.

- Kiumaniere ?

- En Moskvo, kara Sofja Lvovna, ekzistas la ŝtata konservejo de valoraj historiaj aĵoj. Tie konserviĝis ankaŭ ĉi tiu pelto.

- Kiu do portis ĝin antaŭ vi ?

- La rusa guberniestro de Besarabio, princo Urusov. El liaj larĝaj ŝultroj ĝi falis sur la miajn. Ĉu malbonas la heredaĵo?

\* \* \*

La lastaj, kiuj forlasis la ejon de Kieva filio de RATAU, estis geedzoj Rabinoviĉ. Estingante la lumojn, la respondeca sekretario demandis sian edzinon :

- Kion vi pensas pri ĉio dirita de nia Moskva birdo?

- Mi estas konvinkita, ke vi mem ĉion komprenis : "Vivu unu sola kaj nedividebla<sup>18</sup>, kun Stalin sur trono!"



Rabinoviĉ malgaje svingis la kapon :  
- Mi timas, ke baldaŭ venos vico ankaŭ por nia juda tribo...  
... Lev Markoviĉ havis esceptan kapablon flari la politikan aeron.

Vidu la piednotojn sur p. 34.

Elukrainigis : Oksana.

**NIKOLIN' :**

**EL "ALKROĈE AL LA VIVO"**

Elfrancigis : Emile Van Damme

Ĉiu ulo renkontita  
akceptita  
kun scivolema rigardo  
scivolema al tenereco  
kaj komprenemo  
lasas en ni  
signon nedetruieblan  
de parto el sia universo  
persona kaj sekreta.  
Tiel propagiĝas en ni  
la multobla brueto  
de nekalkulebla nombro  
de vivoj.

Ĉia ĝojo  
estas necerta  
kaj nedaira.  
Tio estas scienda  
kaj se eblas  
neforĝesenda.  
Kiam ĉia ĝojo  
komenciĝas  
scii ke la vorto "fino"  
jam enskribiĝis  
en ĝian originon  
kaj kapabli ĝoji pro tio  
ĉar sen la fino  
de tiu ĝojo  
miloj da aliaj ne atingus nin.

Kio estos ni ?  
Ni estos lumo.  
Niaj okuloj jam estas lumo  
kiam ili sin tuŝas.

La tenera kiso  
estas ankaŭ trieco :  
la kiso kiun mi donas  
tiu kiun mi ricevas  
tiu kiun ni interŝanĝas.

Vera dono  
estas ĝojo kaj sereneco  
en spontana gesto.



## PELTO DE PRINCO URUSOV

- Notoj -

1. Ĥarkovo - ĉefurbo de Ukraina SSR ĝis la 1934a jaro.
  2. NKVD - mallongigo de ruslingva : Popola Komisarejo de Internaj Aferoj.
  3. CK de KP(b)U - Centra Komitato de Komunista partio(bolŝevika) de Ukrainio
  4. VKP(b) - Tutsoveta komunista partio (bolŝevika)
  5. Lvova - familiara formo de Lev (Leo)
  6. Lvova el Mogiljovo - dirmaniero. Mogiljovo - urbo en Belorusio.
  7. Ĥviljovij Mikola (1893-1933) - fama ukraina verkisto. Sin mortigis la 13an de majo de la 1933a jaro proteste kontraŭ artefarita malsato en Ukrainio.
  8. Skripnik Mikola (1872-1933) - fama ukraina komunista aganto. Sin mortigis la 7an de junio de la 1933a jaro.
  9. ukrainigo - politiko de transiro de ĉiuj ŝtataj kaj partiaj instancoj en Ukraina SSR al ukraina lingvo kiel oficiala. Daŭris ĝis la 1932a jaro.
  10. Abraŝa - familiara nomo de Abramo.
  11. Sava Morozov - konata rusa miliardulo, simpatianta al bolŝevikoj kaj financanta ilian partion.
  12. Rjazan - urbo en Rusio.
  13. Bastoŝuoj - kutima piedvestaĵo de rusaj kamparanoj en carisma Rusia Imperio.
  14. Andreo Bogoljubskij - rusa princo de la 12a jarcento, ruiniginta Kievon en la 1169a jaro.
  15. Ivan la Terura - rusa caro (1547-1584), konata pri sia krueleco.
  16. Petro la Granda - rusa caro (ekde 1682a jaro), poste - imperiestro (1721-1725)
  17. Besarabio - historia regiono inter riveroj Dnestro kaj Prut. Eniris la Rusan imperion post la 1812a jaro.
  18. "Unusola kaj nedividebla Rusio" - slogano de rusaj monarkiistoj.
- \* KPSU - Komunista partio de Soveta Unio.

---

### Solvo de la krucvorta enigmo de L! 73

Hor. : 1.L.ANTERNIST. 2.ARIERGARDO. 3.BOSIG. JING. 4.OROS. ABS. 5.RU.MEMA. 6.ETKOMERCOJ. 7.VOL. INE. SU. 8.IES. CIGN. 9.TENSIO. VEK. 10. UNITARIANO. 11.LULINFANOJ.

Ver. : 1.LABOREVITUL. 2.ARORUTO. ENU. 3.NISO. KLINIL. 4.TEISMO. ESTI. 5.ERG. EMISIAN. 6.RG. AMEN. ORF. 7.NAJBAREC. IA. 8.IRIS. IVAN. 9.SDN. FOSGENO. 10.TOGO. JUNKOJ.

## MIRFABELO

**Ĉu vi jam aŭdis tion, kio okazis al eta fraŭlo en la nokto de la jarfino en UNO, kie li kutimas labori ?**

**Labori ne estas la ĝusta vorto, estas troa vorto. Fakte, nia fraŭlo, pli mallaborema ol la plejparto el la nelaboremaj, estis ĉiam lerta por trovi novan manieron eskapi el laboro.**

**Tiun fojon li preskaŭ estis punita pro sia emeco. Sed, finfine, male, danke al sia peko, li tranoktis vere mirindajn horojn, kiujn neniu iel jam vivis.**

**Estis la lasta tago de la jaro kaj la tuta laboristaro de la monda organizo UNO aktivis, volante frue fini la laboron por libertempe dum kelkaj tagoj. Inter tiuj aktivoj, movoj, bruoj, nia fraŭlo timegis, ke iu donos al li taskon. Li do ŝirmis sin kelen en unu el la arkivaj ĉambroj. "Hodiaŭ, verŝajne, neniu venos tien", li diris al si.**

**Li eniris ĉambreton malluman, en kiu amaso da paperaĵoj staris ĉie, sur bretoj, en ŝrankoj, sur tabloj, eĉ sub ili, ĉie, ĉie, ĉie... Li apenaŭ povis enŝoviĝi sur altan breton, angule de la ĉambro, malantaŭ pakaĵoj da paperoj diverskoloraj.**

**Ho, mi ne diris al vi, ke nia fraŭlo estis tiel eta, eĉ etega, tre treege malgranda kaj maldika kiel rano aŭ liliputo, ke tio faciligis al li enŝoviĝi ĉien ajn. Tiele, li facile sin kaŝis je la rigardoj de la labordonantoj. Ĉiam li trankvile vivis sian vivon de mallaboremulo.**

**Fakte neniu venis. Perfekta silento plenigis la ĉambron, tiel peza, ke li longtempe dormegis. Eĉ lia ronkado ne vekis lin.**

**En la laborejo neniu prizorgis lin. Ĝenerale oni ne multe kaj ne multe vidis lin. Lia neĉeesto surprizis neniun. Kiam li vekigis, de longe ĉiu rehejmenigis. Li rondiris la tutan domegon : neniun, nenian pordon malfermitan li trovis. En la kuirejo li bonŝance trovis pakaĵeton da nutraĵo forgesitan de kelnerino. Li reiris malantaŭ la paperamason kaj manĝetis, grumblante kontraŭ sia mallaborema tendenco. Ĉie la nigreco, nenia lumo, eĉ ne stelo, ĉar la pordisto fermis la ŝutrojn antaŭ ol foriri.**

**Jen brueto! Li streĉas la oreton al la direkto. Estas kiel susuro. Kio estas ? Liaj okuloj, nun kutimiĝintaj al la mallumo, ekvidas kvazaŭ milionojn da etaj lumetoj. Kio moviĝas en la tuta loko? "Ho!" Li preskaŭ kriegis. Feliĉe, pro timego la krio restis en lia gorgo. Li apenaŭ kredas siajn okulojn! Estas ratoj kaj musoj. Ankaŭ, ĉu liaj oretoj ne trompas lin. "Ratoj kaj musoj ne parolas kiel homoj..." Ĉu li nun komprenas la lingvon**

de tiuj bestoj ? "Ho, kamaradoj, vidu kion ni havas por manĝi dum la laboristoj libertempos!" "Kolonbojn da koloraj flugfolioj kaj leteroj el la tuta mondo!". "Vere, la homoj estas ege skribemaj!" "Ĉu ne ? Rapidu, la tempo pasos rapide".

Subite frakaso aŭdiĝas en la koridoro, lumajoj eniras la ĉambron. La aroj da ronĝuloj enŝoviĝas rapidege en siajn truojn, timigite.

Nia fraŭlo miras, ratojn kaj musojn li jam vidis, eĉ se li neniam aŭdis ilin paroli kiel homoj. Sed lumajojn li eĉ neniam renkontis. Li cerbumas : kio okazas ?

La ĉambro nun estas tiel lumigata, ke necesas, ke li kaŝu siajn okulojn permane. Post momento de surprizego, li aŭdas jenan dialogon :

- "Ho, kamaradoj, ĉar la homoj fermis la grandan kongresan salonon, necesas, ke ni ĉeestu aliloke por kongresi kiel ĉiujare. Ĉu la elekto de tiu vasta ĉambro taŭgas kaj plaĉas al vi?"

- "Mi trovas ĝin bela, sed mi opinias, ke tro multaj paperaĵoj estas ĉie, kie ni laboros".

- "Eble ni povas purigi la ĉambron kaj meti flanken la paperaĵojn!"

- "Vi pravas, ĉiu ek al la laboro, rapide!"

- "La nokto rapide pasos kaj ni ĉiuj, elfoj, feoj, koboldoj, gnomoj, troloj, magoj, sorĉistoj reiros niajn landojn por trovi niajn landajn legendojn."

Nia fraŭlo malfermas tiel grande siajn okulojn, malgraŭ la lumego, kiu fontas el la aperaĵoj, ke li estas blindumita. Ĉie en la ĉambro la lumajoj klopodadas por ordigi. Subite iu el ili mire kriegas.

- "Ho, ĉu vi legis la paperojn?"

- "Tute ne! Ne estas niaj propraĵoj! Restu diskreta, mi petas!"

- "Ne! Ne!" insistas la unua. "Tio estas ege interesa! Legu mem!"

- "Jes ja! Oni parolas pri monda lingvo, eĉ verda. Verdo estas koloro de la espero! Ĉu ne? "

- "Vere interesa, plena de mirindaĵoj!"

- "Vidu la leterojn, la petaĵoj venas el la tuta mondo!"

- "Ĉu vere ekzistas monda lingvo kiel oni diras tie?"

- "Ho, rigardu! Tie staras lernolibro!"

- "Kiu estas Zamenhof?" "Neordinara nomo!"

Nia fraŭlo miras pli kaj pli : "Vere en tiu domo de la tutmondo trovi mondan lingvon ne devus esti tiel mirinda!"

Tamen neniam li aŭdis pri ĝi. Estas vero, ke li pli ofte dormas ol laboras! Li malfermegas siajn orelojn. Tio, pri kio la lumajoj parolas, estas ege interesa. Aŭskultu!

- "Post legado de la afiŝoj, libretoj, gazetoj, peticioj, leteroj senditaj el la tuta mondo, ni, elfoj, feoj... grupigitaj ĉi tie, decidu rapide lerni Esperanton. Danke al nia grandega kapableco unu nokto sufiĉos. Poste ni reiros niajn landojn kaj per ventoj kaj lumo de luno kaj je la rapideco de la lumo faros kion ni ĵuris ĉi tie".

- "Antaŭe, kunportu la paperojn antaŭ la direktoran laborĉambron!"

- "Verŝajne ĉi-tieaj homoj laboras kontraŭ tiuj mondanoj. Ni, male, agados por helpi ilin!"

Terurigite, la ronĝuloj el siaj truoj vidas sian nutraĵon eskapi al ili. Kion ili manĝos ? Ĉiujare tiu verdaĵo bone nutris ilin! Aĉaj feoj! Pri kio ili zorgas ?

Post tiel granda bruoj kaj lumoj, subite la ĉambro retrovis sian silenton, mallumon, trankvilecon. Nia fraŭlo rapide refalis en dormon kaj sonĝon. Kion alian fari? Necesis atendi la postlibertempon por foriri. Ju pli li dormos, des pli pasos la tempo. Kiom longe li dormis ?

Ian matenon, bruegon kaj kriegon li aŭdis kaj li vekigis. La domo ekbruegas de ĉie. Li longe oscedadas, sin malstreĉas kaj supreniras la koridoron. Ĉu li sonĝis aŭ ne ? Certe ne! ĉar la paperoj ne plu staras en la ĉambro. Eĉ se li dubus, kion li aŭdas, maltrompus lin :

- "Ĉu vi vidis la amason da flugfolioj ĉe la direktora ĉambro?"

- "Kiu alportis ilin spite fermitajn pordojn?"

- "Ĉu vi legis la gazetaron? Oni diras, ke en la tuta mondo ĉiu gazeto aperis en du lingvoj, la landa kaj la mirinda monda lingvo!"

- "Tamen la ĵurnalistoj verkis en siaj landaj lingvoj, fine de la ĉeno de la rotacipresiloj la ĵurnaloj estis mirakle en du lingvoj!"

En angulo de la koridoro nia fraŭlo, kun vizaĝo kolorita pro emocio, nun bone komprenas la lastajn parolojn de la lumajoj.

Ĉu li ekprofitos la okazon esti monde famkonata ? Ĉu li parolos pri sia aventuro ? Finfine, ne, ĉar ĉu li daŭre povus eskapi el la laboro ?

Sed nun li bone scias, kiel tie la ronĝuloj estis tiel grasaj, bone nutritaj de la verdaĵoj senditaj de la esperantistaro ĉiujare. Kaj per tio, ĝis nun, la potenculoj nenion faris. Tesa.

Lina Gabrielli :

## Maltrankvila vespermanĝo

Decembro, jam decembro! Kaj mi ankoraŭ ne estis ĝuinta miajn feriojn! Bezonigis hasti, por ne perdi ilin. Tial mi diris al mia patrino : "Mi iros al Milano!". Sed mia patrino, sciante, ke en Milano loĝas Karlo, respondis : "Al Milano ĉi ne iros, ĉi iros al Roma". Ĉar mi ne havas tro da intereso por Karlo kaj en Roma kompanio ne mankas al mi, mi ne protestis. Cetere, en Roma, mi povas loĝi en la ĉambro de mia fratino, kiu forestos dum kelka tempo, kaj en Roma la suno varmigas eĉ vintre.

Tamen atenton! Kiam mia fratino devis foriri el Roma, travivadis dramajn tagojn, ĉar la maljuna fraŭlino, luiginta al ŝi ĉambrom, timis resti sola nokte. Tio estis cirkonstanco absolute konsiderenda, por ne fali en kaptilon. Ve, diri al ŝi, ke mi iras al Roma pro decido de la patrino, pro mia bono !

Kiam dum lazura kaj varmeta posttagmezo mi atingis la apartamenton de fraŭlino Ginevra, mi iom ruze, iom takte diris al ŝi : "Mi planis, iri al Milano. Poste mi memoris pri via soleco; mi pensis, ke ankaŭ Roma estas bela, eĉ pli bela ol Milano. Tial mi venis Romon... Vi ne plu estos sola, dum mi restos ĉi tie..." Tiel mi certigis al mi liberecon kaj dankemon.

Fraŭlino Ginevra ĉirkaŭbrakis min plorante : "Kiel bona vi estas, kiel bona! Sufiĉas al mi scii, ke vi revenas vespere, ke iu estas en mia hejmo dum la nokto. Mi ne bezonas pli."

Ironio de la sorto : panjo ne volis, ke mi iru al Milano pro Karlo ; kaj Karlo estis en Roma ĝuste, kiam mi iris tien. Li restis en la ĉefurbo pli longe ol mi. Sed por ke ĉio plenumiĝu laŭ la deziro de mia patrino, hazarde alvenis duko Vilhelmo por reordigi la fadenon.

Jen la faktoj :

Noktiĝis, kiam en la ĉambro de mia fratino sonis la telefono. Mi alkuris tien por respondi.

"Estas mi, duko Vilhelmo, tiu, kiu dezirus fondi kun vi ĵurnalon..." "Ho, jes, mi bone memoras. Ni renkontiĝis antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Bologna... Ĉu la kongreso sukcesis? Jes, se mi diras, ke mi fariĝis esperantistino. Ĉu mi verkas ? Jes, ĉiam... Verki estas mia pasio. Nun ĉi tie en Roma,

troviĝas iu mia amiko, ĵurnalisto kiel mi, kiu havas belegajn projektojn. Vi povus interkonatiĝi... Se ni estos tri, ni povos efektiviĝi multe pli".

Ĉar Karlo ne estis en Roma kaj Vilhelmo venis en la ĉefurbon, el la sudo de Italujo, mi entuziasme aranĝis plej baldaŭ la renkontiĝon. Kaj de tiam ne plu estis eble al mi, vidi Karlon. Ĝuste tiel deziris mia patrino.

Novaĵojn pri Karlo mi ricevis de Vilhelmo, kiu atendis min ĉiun posttagmezon antaŭ la pordego de Palaco Doria, kie mi loĝis. Li akompanis min dum vizitado de geamikoj, de koncertoj, de la ĵurnalista klubo en Palaco Marignoni kaj kien ajn mi volis iri. Ni preferis lokojn, kie troviĝas homoj por babilo. Do, neniu preĝejo, neniu muzeo, neniu artaĵo aŭ panoramo interesis nin. Duko Vilhelmo ne havis konatojn aŭ amikojn en Roma, pro kio li facile profitis la miajn. Li tiel multe ŝatis babilo, ke li neniam lasis, ke oni interrompu al li. Tamen tio ne ĝenis min, ĉar li estis tre interesa babilanto. Mi ne scias, ĉu aliaj estis ĝenataj de la nura aŭskultado.

Do, Vilhelmo antaŭtagmeze estis kun Karlo kaj posttagmeze kun mi. Ne eblis triopiĝi kun Karlo. Malgraŭ tio, Karlo de tempo al tempo telefonis al mi, eĉ se nur por diri : "Mi estas tre okupata".

Jes, Karlo estis tre okupata kun Vilhelmo kaj sen Vilhelmo. Mi kontentiĝis per tiuj malmultaj vortoj je la telefono donantaj al mi la impreson, ne esti forgesita. Mi ŝatis aŭdi lin je la noktomezo diri al mi : "Infaneto, ĉu vi ne hontas, ke ankoraŭ vi ne enlitiĝis?" Jes, mi sentis por Karlo grandan simpatian kaj bonvolemon. Ili restas netuŝitaj de la tempo, malgraŭ la aserto, ke la tempo senkolorigas ĉion.

Fraŭlino Ginevra estis plene kontenta pri mi. Fakte neniam estante soleca kaj enua, mi disradiis mian ĝojon pro vivo. Antaŭtagmeze mi iris al vendejo en Placo de Trevi por aĉeti; kuiris, aranĝis la kuirejon. Posttagmeze mi estis kun Vilhelmo. Mia entuziasmo prosperis skui la lacan melankolion de la maljuna fraŭlino. Mi rakontis al ŝi miajn travivaĵojn en Roma kaj ŝi ridetis : "Vi estas bona, via fratino malsimilas al vi..." "Mia fratino estas pli bona ol mi. Sed ŝi loĝas ĉi tie kaj ne ĉiam laboras. Se ŝi ne laboras, ŝi timas la morgaŭon. Mi elektis veni ĉi tien. Mi ferias."

Estis alia vero ne direnda. Mia fratino timis fraŭlinon Ginevra, kiu sciis tion kaj profitis. Tiam mia fratino estis ĉiam malbonhumora.

Finfine iun vesperon mi renkontiĝis samtempe kun Vilhelmo kaj kun Karlo en kafejo de "Via Veneto", por gustumikaŝon en lumo de kandelo. Por plezuro de promeno, Vilhelmo kaj mi alvenis piede post longa irado, dum Karlo atendis nin apud tablo.

Pli poste Vilhelmo diris al mi : "Karlo volus inviti nin ne nur por kafo, sed ankaŭ por vespermanĝo... sed li ne naĝas en bonaj akvoj..." "Ĉu li volus inviti nin kaj ne havas monon? Ho, mi povus inviti vin ambaŭ hejmen por esti iom kune..." Mi diris tion nur por diri, sen ia sincereco, ĉar mi bone sciis, ke en la hejmon de fraŭlino Genevra neniu povas veni. Kaj en restoracio tio estus multekosta al miaj financoj. Sed Vilhelmo tuj kaptis miajn vortojn, senhezite. Ŝajnas, ke li atendis ĝuste tiujn vortojn. Ja antaŭ ol mi havis tempon repreni miajn vortojn, li respondis : "Ni kontentiĝos je malmulto : sufiĉas nur pikniko". Kaj la venontan tagon je la oka horo, kiam mi vekigis, li telefone komunikis : "Mi jam parolis kun Karlo. Ni venos ĉi tiun vesperon".

Mia Dio, kiel mi solvos la aferon? Ne utilus peti permeson al fraŭlino Genevra. Post kiam ŝia fianĉo mortis dum la unua mondmilito, ŝi ne permesis al iu ne parenca viro, eniri ŝian loĝejon. Mi sciis, ke ŝi je la 21-a horo eniras sian litan ĉambron el kiu ŝi eliras nur post apero de la nova tago. Pro tio mi ĉiam rehejmenigis antaŭ la 21-a horo. Genevra atendis min kaj restis kun mi nur ĝis la kutima horo. Poste, se estis en programo, mi denove foriris. Ŝi ne povis supozi tion. Se mi tirus sencese la ŝnureton de la sonorileto, ŝi ne formetus eĉ la pinton de la nazo. Mi tion spertis, kiam iun vesperon, forgesinte la ŝlosilon, mi ne povis rehejmenigi. Do, ĉu mi risku nun enirigi Karlon kaj Vilhelmon ? Mi provos.

Sed la glasoj, la teleroj, la forkoj, la tranĉiloj ? Ili estis ŝlositaj en ŝranko. "Se temas nur pri pikniko", sugestis al mi mia amikino Lilia, al kiu mi konfidis mian dilemon, "sufiĉas aĉeti telerojn kaj glasojn el kartono. Tio estas simpatia kaj moderna solvo".

Lilia akompanis min en butikon por aĉeti kolbason, fromaĝon, panbulojn kaj fruktojn ; kaj ŝi konatigis min kun la kartona mangilaro. Krom tio ŝi akompanis min ankaŭ sur la longa kaj mallarĝa ŝtuparo, ĝis la sesa etaĝo. Ŝi iris antaŭe kaj tiris la ŝnureton de la pord-sonorilo dum mi kaŝis la aĉetaĵojn malantaŭ la plantoj ornamantaj la ŝtuparon.

"Fraŭlino", mi diris, kiam Genevra malfermis la pordon, "mi prezentas al vi mian karan amikinin Lilia". Lilia eniris en la saloneton aŭfable enpŝite de la dommastrino. Ambaŭ eksidis kaj babilis. Trovante laŭ la plano de Lilia liberan kampon, mi elprenis la paketojn kaŝitajn malantaŭ la plantoj kaj enportis ilin en la ĉambron de mia fratino. Fine, demetante ĉapelon kaj mantelon, mi partoprenis la konsersacion. Tre baldaŭ Lilia foriris. "Ĉu vi restas hejme?", demandis fraŭlino Genevra. "Jes, estas jam malfrue por foriri", mi respondis. Tre feliĉa ŝi restis kun mi ĝis la 21-a horo. Kaj kiam ŝi apartiĝis en sian dormoĉambron, mi denove vestis min kaj iris, preskaŭ kurante, al Palaco Marignoni, en kies ĵurnalista klubo miaj amikoj atendis min. Ni tuj aliris al mia loĝejo. Kun la nigra mantelo kaj la hela ĉapelo vualornamita, mi aspektis tre eleganta. Sed Karlo, ŝerckomplimente, vidante min ekskuigi pro bruo de bombeto, ridegis : "Ĉu gravas via mortiĝo? Vi ne valoras eĉ kvin lirojn". Mi ŝajnis ofendita. Sed en la realeco mi estis kontenta pro la cirkonstancoj, kiuj sen mia volo permesis al mi interesan aventuron.

Ni eniris piedpinte, por ke Genevra ne aŭdu nin. Kaj mi silente en momento preparis la tablon. Kaj post nelonge Karlo kaj Vilhelmo tute forgesis min, ĉar ili enprofundiĝis en la gustumado de la manĝo kaj de la parolado.

Karlo rememoris la militan tempon tre malmildan kaj riskigan. Li rakontis pri sia batalo en tombejo, tra la neĝo, kiam li evitis pafilojn malantaŭ krucoj. Li rakontis, kiel oni rakontas fabelojn, ne kiel spertitajn travivaĵojn; kaj mi estis ĉarmita pro liaj vortoj kaj moleco de voĉo entenanta apartan tembron. Mi vidis min en la tombejo, malantaŭ la krucoj, tremanta pro frosto, ekscitata pro la aventuro. Kial mi naskiĝis ne viro ? Ne mankus al mi okazoj por eksterordinaraj travivaĵoj. Sed la malproksimiĝo de la ĉirkaŭa mondo ne daŭris. La timo, ke fraŭlino Genevra povus aperi subite, fermis mian gorĝon, skuante min dum la plej ĉarmaj revoj. Ni manĝis malrapide, preskaŭ susurante. Do, kial timi? Fraŭlino Genevra ne povis aŭdi nin. Sed mi timis malgraŭ miaj optimismaj pensoj kaj mi ne sukcesis gluti. "Ŝi ne aŭdas, ŝi ne aŭdis, eĉ kiam mi tiris la ŝnureton de la hejmsonorilo dum preskaŭ la tuta nokto", mi troigis. "Tamen ĉi-foje ŝi povus bezoni necesejon, glason da akvo, ion ajn..." Feliĉe la vortoj, aŭ pli bone dirite, la susuroj de Karlo rekondukis min en la mondon, al kiu mi volus aparteni kaj vekis en mi nostalgion, pri ĉio kion la vivo

donus al mi, se mi povus konsenti mian entrepreneman naturon.

Fine, kiam ambaŭ ekstaris, - kaj Karlo kisis min frunte por adiaŭo, kaj mi ambaŭ vidis malsuprenirantaj sur la ŝtuparo sen mi, - kaptis min profunda malĝojo, sed ankaŭ liberiga sento pro la evitita danĝero, vidi antaŭ ni fraŭlinon Ginevra.

\*

Kiam klare tagiĝis kaj mi en la kuirejon preparis kafon, Ginevra parolis al mi pri nekutima brueto. "Ĉar mi sciis, ke vi estas hejme, mi ne volis esplori. Tamen, kia tentiĝo!"

Tion mi rakontis al alia amikino, Adriana; kaj ŝi eksplodis amuzite : "Kial vi ne metis la kofron, kiu staras ĝuste en la manĝejo, antaŭ la dormoĉambro de Ginevra? Ho, ĝi malhelpus tute certe la eliron!"

\*\*\*\*\*

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										
11										

### KRUCVORTENIGMO

#### Horizontale:


1. - Ĉiel. 2. - Persono, kiu plej ofte vidas en Esperanto nur amuzafon (s.f.). 3. - Donaco al Dio (s.f.). - Rilata al akra rando de objekto. 4. - Malofte en la manoj de la 2. horizontale (s.f.). 5. - Virina nomo, interalie de franca reĝino, kiu en ia cirkonstanco perdis la kapon. 6. Okaza maristo. - Farita al ĉiuj, kiam oni edz(ini)igas. 7. - Neas (neologismo). - Kemia simbolo de gaso. 8. - Kaverna (poezie). - Putra difektiĝo de ostoj (s.f.). 9. - Mi kaj

vi. - Instigi iun veni al io. 10. - Birdo... sen vosto. - Senpiedulo.

11. Baudelaire prenis ĝin kiel komparilon en fama poemo, kiu temas pri poeto (tradukita de Kalocsay).

**Vertikale:** 1. - Facile nutrota. 2. - Homido. - Juvelaĵo dekoraciita iamaniere (s.f.). 3. Li vigle uzas siajn sentojn kaj spiriton por eviti ion (s.f.). - Simbolo de malofta metalo. 4. - Fajfanto. - Enhavanta malĝustajn. 5. - Prepozicio. - Planto kun ruĝaj aŭ bluaj floretoj venena al birdoj. 6. - Malgiata. - Mara birdo (s.f.). 7. - Internacia sufikso uzata por formi nomojn de artoj aŭ teknikoj. - Instrumento por aŭskultumi la orelojn. 8. - Malpezan, delikatan. - Efikos sur, pp. kemia substanco. 9. - Impresi per sia karmina koloro. - La lasta estis hemofilia. 10. - Ekhavi per multe da petoj. - Sufikso uzata por derivi numeralojn. (s.f. = sen finaĵo)

Sfinksido



### ĈU NI DEVAS RESPEKTI ĈIUJN RELIGIOJN ?

El numero 71a de "L!" post bonega artikolo pri psikotransformismo mi miregante konatiĝis kun du aforismoj : "Ni povas nur fortostreĉi esti kristanoj" kaj "Respektu ĉiujn religiojn".

Kiu estas la aŭtoro de tio ? Kiu aplombe asertas, ke kristanismo superas aliajn religiojn aŭ aliajn personojn, kiuj praktikas nenion ? Enestas ankaŭ kontraŭdiro kun la antaŭe citata aforismo : "Povas esti justa nur kiu kapablas "meti" sin en la pozicion de aliaj".

Sciante, ke ili estis kreitaj de la homoj, kial oni devus respekti ĉiujn religiojn ? Kio povas respektigi ilin kaj iliajn pastrojn ?

Certe mi scias, ke ĉiu religio havas sian bonan, eĉ bonegan flankon, sed mi ne povas respekti ĝin, kiam ĝi politike intrigas aŭ murdigas, rekte aŭ en sia nomo, pere de individuoj kaj homamasoj; do kiam ĝi ne respektas nin.

Ĉu admirinda tia religio, kiu pro dia justeco stumpigas siajn pekantajn adorantojn, konsentas nur solan verecon, la sian, kaj perforte trudas sian leĝon, mortigante se necesas ?

Kian faman premsignon prezentas la batalantoj, kiuj agas uzante religiajn nomojn, kiel ekzemple la kristanaj kaj muzulmanaj milicoj en Libano ?

Kion diri pri la blindaj israelaj reprezalioj nome de la repuna leĝo de la biblio ?

Ĉu la Sudafrikanoj ne misuzas la saman libron por senkulpiĝi siajn rasajn leĝojn ?

En Irlando, jam de pluraj dekoj da jaroj batalas inter si katolikoj kaj protestantoj.

Kial tiuj sangaj bataloj inter hindaj piuloj de diversaj religioj aŭ eĉ de adorantoj de la samaj dioj sed de aliaj sektoj, foje en la temploj mem ? Kie restas la bildo de la religia pacema hindo ?

Nun ni povas ĉagrene rigardadi budaistajn monakajn mani-

festaciantojn kaj ni demandas nin : Ĉu Budao, la Saĝulo, ne tuj vekigōs el sia eterna vakuo ?

Ĉu ni ne forgesis, ke la nuna japana imperiestro estis konsiderata kiel vivanta Dio ĝis la fino de la lasta mondmilito ? Kiom da oferoj lia nomo okazigis ?

Ĉu necesas memori la homajn ritajn oferojn de preskaŭ ĉiuj antaŭaj religioj ?

Jes ja ni pardonas, sed ĉu ni povas forgesi la multajn krimojn de la katolika Eklezio ? Dum jarcentoj ĝi turmentadis la judojn, protestantojn, muzulmanojn, liberpensulojn, kaj ĝenerale ĉiujn, kiuj ne pensis kiel ĝi volis. Milionojn da homoj ĝi mortigis : dum la krucmilitoj, post la malkovro de Ameriko, dum la inkvizicio..

La martirigoj de la unuaj ne senkulpigas la krimojn de la aliaj.

Kion pensi pri la nunaj ĉiuspecaj fipredikantoj, kiuj dank'al la stulteco de tro da kredantoj senĉese kaj senskrupule sin riĉigas ?

Pensenda estas jeno : dum sia komenco religio eble suferas sed post sia sukceso ĉiam ĝi suferigas.

Edgard JAMART

### NI REVENU AL LA FONTO

Mi esperantistiĝis en la unuaj monatoj de 1934-a, kiam mi estis 19-jara. Tiam troviĝis ankoraŭ inter la vivantoj multaj samideanoj, kiuj estis konintaj persone la aŭtoron de la lingvo kaj la spirito de la Bulonja Kongreso de 1905-a daŭris viva en la esperantistaj vicoj ; tial ni ĉiuj klopodis imiti la Zamenhofan stilon.

Sed post la nomata Dua Mondmilito (1939-1945) novaj generacioj de Esperantistoj komencis enkonduki en la lingvon amason da tute ne necesaj neologismoj; ankaŭ ili kontraŭstaras la uzon de la prefikso "mal", kiu, ĝuste faciligas la lernadon de Esperanto ; same ili rifuzas kunmetitajn vortojn.

Resume : oni klopodas malfaciligi tion, kio estas facila. Tial ĉiuj laŭdas iun mamutan gramatiko-libron 900-paĝan, grandformatan, kiu klarigas (ĉu ĝi "klarigas"?) la 16 reguletojn.

Mia ideo estas tute alia, kaj se tio estus ebla, oni devus faciligi ankoraŭ pli la simplecon de la lingvo.

Kial ni bezonas, ekzemple, **plu**, **plus** kaj **pli** ? Sufiĉas **pli**. Se mi skribas : "Du pli du estas kvar", ĉiuj komprenos. Kial **pesi** kaj **pezi**, **ŝargi** kaj **ŝargi** ? Kial **da** kaj **de** ? Sufiĉas **de**.

Se mi skribas : "Mi trinkas glason de vino", ĉiuj komprenos, ke mi trinkas la vinon, kiun enhavis la glaso. Kial **po** ? Sufiĉas **ĉiu**. Kial **ju** kaj **des**, kiuj estas malmultege uzataj? kc.

Tio esprimita en la antaŭa paragrafo estas nura spekulativa aĵo. (Pri la vorto "Spekulativa" diras vortaristoj : "Bazita sur pure teoria rezonado, celante nur la scion, sen ia ajn praktika utilo").

Nu, la plej bona maniero honori la memoron de la aŭtoro aŭ iniciatoro de Esperanto estas reveni al la fonto, nome, al la senartifika, pura, klara kaj simpla lingvo de la unuaj tempoj. Kaj la aspirantoj fariĝi poetoj versumu imitante al Zamenhof, Grabowski k.a. kaj ili ĉesu meti linion sub linion kaj fanfarone esprimi poste, ke tio estas poeziaĵo. Legu ĉi tion :

la strangaj  
strangaj riveroj de l'sango  
vane disbranĉiĝas  
varma vento  
ondas  
ĉe via  
frunto  
ondas

Mi ne volas ofendi la aŭtoron de tiuj ok liniojn, kiujn mi legis en fama antologio, ĉar li havas la rajton esprimi libere kaj laŭplaĉe siajn sentojn ; sed mi min demandas : ĉu tio estas poeziaĵo ?

Ni revenu al la fonto! Ni revenu al la simpla kaj klara Zamenhofa Esperanto!

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtemuloj!

A. Lopez Luna

### ĈU RIĈECO ?

En la nuna esperantistaro disvolviĝas tendenco al kreado aŭ adoptado de multaj neologismoj, por igi nian lingvon tiel riĉa kiel la naciaj. Mi ne sisteme kontraŭas\*. Mi scias, ke Zamenhof estis la unua inventisto de neologismoj, kaj ke ĉiuj bonaj verkistoj sekvis lian ekzemplon. Kiam Kalocsay aŭ Waringhien metas en siaj belaj versoj bone naskitajn novajn vortojn, mi aplaŭdas. Sed ni ne estas Kalocsay aŭ Waringhien, ni ne estas grandaj poetoj ; ni ne estas Zamenhof, por genie

-----  
\* Niaj legantoj povas konstati, ke mi mem volonte uzas ne malmultajn neologismojn.

inventi novan lingvon. Ni, ordinaraj uzantoj de la lingvo internacia, ne forgesu la du grandajn principojn de tiu lingvo, nome: la principon de neceso kaj la principon de sufiĉo. Kiam ni emas adopti novan radikon, ni ĉiam metu al ni jenajn demandojn: Ĉu ĝi estas vere necesa? Ĉu ne sufiĉas ĉerpi el la jam ampleksa vorttrezoro konsistigita de la Fundamento kaj pliriĉigita per la sinsekvaj aldonoj troveblaj en PV kaj PIV?

En L! 73, ĉenletero, mi legas el la plumo de J.C.Picquet, kiu cetere lerte verkas, la vorton "sekolo". Ĉu necesa? Ĝi povas plaĉi al anoj de latinidaj lingvoj, sed mi rimarkas, ke la germanoj ne bezonas novan vorton por "Jahrhundert", kiu estas ekzakte ekvivalento de nia "jarcento". En la franca lingvo ni havas apartajn vortojn por jarkvino (lustre), jardeko (décennie), jarcento (siècle), jarmilo (millénaire). Ĉu tio signifas veran riĉecon? Eble, sed la riĉeco de esperanto estas de alia naturo: ĝi konsistas ĝuste el tiu genia aglutina vortfarado, kiu permesas formi amason da vortoj el malmulte da radikoj. En ĉiu okazo ni strebu sobre uzi tiun eblon, kaj celkonscie formi la necesajn vortojn el nia provizo da elprovitaj radikoj. Ni akceptu sufiĉe da neologismoj, sufiĉe sed ne tro. Tro estas tro!

Ĉu vere ni estos pli riĉaj, kiam niaj vortaroj ŝvelos ĝis la diko kaj pezo de la nacilingvaj? Miaopinio ne. En iuj okazoj ĝi eĉ kondukas al malo. Kelkaj volas forigi, aŭ lasi al kadukiĝo la prefikson "mal"; ili inventis, por ekzemplo, la adverbos "poke". Mi pretendas, ke ĝi estas malpli preciza ol "nemulte" aŭ "malmulte", inter kiuj ekzistas grada nuanco.

Ni konsideru la demandon ankoraŭ el alia vidpunkto. Se iam estonte la homidoj estos denaskaj esperantistoj, ili senpene akiros kaj asimilos grandan kvanton da vortoj, kiel ni nun en nia gepatra lingvo. Sed ni vivas en nuno, ne en estonteco. Ni ne naskiĝas esperantistoj, sed ni devas lerni la lingvon internacian kiel fremdan lingvon. Ni do ne plenstopu kaj ne superŝarĝu nian memoron per balasto.

Kiu fiksos la konvenan limon al multigado de neologismoj? Nu, la komuna uzado, sankciita de la Akademio per publikigado de la periodaj aldonoj al sia listo de oficialaj radikoj. Ni fidu al la prudento de nia diligenta kolegaro.

**VALO.**

## LA AMIKECA RETO

*estas tute aparta propono.*

*Ne temas pri dua pasport-servo. Atente legu la klarigojn de Gérard Rollin. Temas pri originala rimedo por faciligi verajn interŝanĝojn inter esperantistoj! Ne serĉi tion, kio estas eksterordinara, sed montri tion, kio riĉigas, plenumas vian vivon, diskuti pri kio zorgigas vin, partoprenigi vian hobion, malkovrigi vian medion.*

*Gastigado ne estas la celo, gastigado ne estas deviga.*

*Nicole D.*

### S.A.T. PROPONAS ALIAN TURISMON!

**En la jubilea kongreso de SAT en Bulonjo-ĉe-Mar, inter multaj interesaj eroj, oni rimarku la kreadon de nova servo kun tute originala celo sed absolute esperantisma.**

Fakte, dum la kunveno de la stariga komisiono ni flanken puŝis la titolon "Servo" profite al la de "RETO", ĉar ĝi ne celas servi, aŭ helpi, aŭ gastigi, kiel faras aliaj E-organizoj. La "Amikeca Reto" (jen ĝia nomo!) intencas ja favori multaspektajn interŝanĝojn. Tiu nova reto proponas alian turismadon anstataŭ aŭ pluse de la muzeoj, vidindaĵoj kaj ruinoj. Ĝi emas pli intime ekkonigi landon en ĝian socian vivon per alproksimiĝo al la lokaj esperantistaj membroj en ilia kutima vivo.

Konkrete, la membroj de la reto - ni diru "la akceptantoj" - proponas la vizitadon ĉu de siaj domo, ĝardeno aŭ personaj vivejoj, ĉu de siaj laborejoj en kruda realeco. Eĉ la amikoj, la najbaroj, parencoj neesperantistaj povas kontribui en la pliriĉigo de la proponoj, dum la akceptanto estas peranto kaj tra dukanto.

Tiel, post kelkdekoj da aliĝoj dum la kongreso, la nova servo de SAT proponas la vizitadon de teatrejo, de lernejoj, de sindikatejoj, biologiaj nutraĵvendejoj, radiostacio, universitata biblioteko, anarkiista renkontejo, maljunulejo, fiŝkaptista haveno, E-eldonejo, distra parko profite al la tria mondo, fabrikoj de industriaj oleoj aŭ de pumpiloj, aŭ de akvo-enboteligado, ktp, ktp...

Oni jam vidas, ke la enteno estas tre varia kaj ke niaj gesamideanoj povas konstrui ion neimiteblan kaj grandiozan, se



ili bone komprenas la spiriton de "Amikeca Reto". Ĉar se la akceptanto proponas tion senpage, li kompanse esperas ion, kiu varias laŭ la individuoj, sed kiu povas resumiĝi jene : ili estas sinceraj esperantistoj, ofte izolitaj, kiuj volas paroli la lingvon, ekkoni alilandanojn kaj eble amikiĝi. Ili konsentas esti gvidantoj en nekonata loko, sed kondiĉe ke la vizitanto interesiĝu, demandu aŭ eĉ kunportu kun si aliajn informojn.

Gvidantoj, jes! Gvidistoj, ne!

Tiaspirite, la **Amikeca Reto** intencas rilatigi tiujn, kiuj emus diskuti pri diversaj temoj okaze de vojaĝo aŭ eĉ perletere. Oni komprenu, ke vera turismo celas alproksimiĝi al la reala vivo de la loĝantoj, kaj ke tiu alproksimiĝo povas okazi nur per komuna vivado. Tiel, la akceptantoj de la **Amikeca Reto** proponas aktivajn agojn kiel bicikladon, naĝadon, ĝardenadon, boatadon, kuiradon, kaj multajn aliajn precizajn erojn.

### Kion fari tuj ?

Post kelkaj semajnoj aperos la unua adresaro de la reto, kiu estos vendota al ĉiuj, kiuj emus vojaĝi pere de ĝi. Nuntempe, ni plezure ricevos pliajn aliĝojn al nia amikaro: tio estas tute senpaga kaj ebligas poste la senkoston uzadon de la servo. La informoj donitaj de vi estos ĉiam modifeblaj kaj forigeblaj. Do kial prokrasti?

Ĉu vi emus vojaĝi kun ni?

Gerardo Rollin

\*\*\*

Bonvolu eltondi kaj sendi la ĉi-apudan aliĝilon, antaŭ la 31a de decembro '87 al :

Amikeca Reto, c/o Rollin,  
63 rue de la République  
Chargé  
F-37530 AMBOISE (Francio)

tel: 47 57 55 63

## LA AMIKECA RETO

\*\*\*\*\*

Mi volas esti akceptanto de la reto : (skribu klare)

Familia kaj persona nomoj:

Plena adreso:

LANDO

Telefono

Naskiĝjaro

Profesio

Mi loĝas

km norde/sude/oriente/okcidente de

kaj

km norde/sude/oriente/okcidente de

Publikaj transportiloj

Ĉirkaŭstreku kaj plenigu laŭvole! Precizigu ĉiuneron plej detale!

### MI PRETAS VIZITIGI :

Mian domon

/ĝardenon

/kelon

apartaj rimarkoj

Mian vilaĝon

/urbon

/kvartalon

pliaj informoj

Alian lokon (pere de najbaro, amiko, kolego, parenco, de mi)

sindikatejon

kooperativejon

fabrikon

lernejon

vendejon

maljunulejon

feriejon

asociejon

aliaj ideoj

### AKTIVAJ PROPONOJ :

biciklado

piedpromenado

ĝardenado

kuirado

muzikado

naĝado

abelzorgado

boatado

plukado

hejmludoj

E-instruado

sportado

Aliaj ideoj; rimarkoj

### MI EMUS DISKUTI PRI :

interŝanĝo de ideoj, spertoj, dokumentoj

ŝatokupoj

ktp

Eĉ PERLETERE mi diskutemus

### MI ESPERAS DE LA VIZITANTO :

helpen en

partoprenon en

kunporton de

interŝanĝon de

aliaj esperoj (nepraj? eventualaj?)

Antaŭanonco:

LETERE

TELEFONE:

..//...



**LASTLASTAJ RIMARKOJ KAJ ATENTIGOJ :**  
(tiun lokon uzu por eventuale pli detale klarigi punktojn menciitajn aliflanke)

**AMIKECA RETO**  
c/o **ROLLIN**  
**63 rue de la République**  
Chargé  
**F - 37530 AMBOISE**  
**FRANCIO**

zeto "LAÛTE!"

rejo-eldonejo :  
s - F 47340 LAROQUE  
p 3371 74 M Bordeaux

abonantoj mem kiel  
uzebila por propraj  
o, sen cenzuro.  
ajn regulajn rubrikojn,  
informojn pri lokaj  
itan de la abonantaro.  
ia amplekso ne povas  
povas aperi felietone.  
ankaŭ rektajn inter-  
toj, tiuj povas aperigi  
aj ricevas, principe  
gatan adresaron.  
j jare. La amplekso  
ia, kun ebleco atingi  
to, laŭ la abundo de

organo de asocio, sed  
povas aboni ĉiu ajn  
ta aŭ pli lerta, sen-  
lenco.  
lu jarojn...  
zanto A aŭ B :

**Por esti abonanto/monprovizanto**  
li minimume 100-frankan provizon kaj elekti :

**LAÛTE!** ĝis elĉerp-  
taĝo : ebleco ricevi  
ajn elektitajn inter-  
se la mendo atingos  
afrankon.

o de via "konto" vi ricevos informon ĉiun jarfinon kaj ĉe baldaŭa  
o signifas aŭtomatan rezignon de la abono.  
o aŭ mendi en landoj, kie eblas sendi poŝtĝirojn al Francio, prefere  
per irpk., bankbiletoj, neuzitaj francaj poŝtmarkoj (nepagipovaj landoj : filateli-  
nto).

razilio : B.E.L.

aixa Postal 11-1105,

084 Brasilia - DF

a Aparecida Anacleto 111, 04809 Sao Paulo (dua peranto)

Japanio : TUBOTA kôki,

Higasimikuni 3-9-12-816

Yodogawa-ku, Oosaka-si (532)

Svedio : Pelle PERSSON,

Svartviksvägen 14

123 52 FARSTA

**La Broŝurservo**

prizorgata de "Cercle amical esp. agenais"

(samaj adreso kaj poŝtkonto kiel "LaÛte!")

celas etkoste eldoni diversajn tekstojn  
(originalojn, tradukojn, lernilojn...) por  
propra broŝura serio, por la Broŝurservo  
de SAT, aŭ por aliaj personoj aŭ asocioj.  
Informoj pri vivo de la broŝurservo regule  
aperas en "LaÛte!", kiu krome aperigas  
tekstojn tro mallongajn por konsistigi  
apartajn broŝurojn.

Por la plimultaj tekstoj la eldonkvanto  
estas limigita. Tial ni konsilas samtempan  
abonon al **LaÛte!** kaj al la broŝura serio  
(monprovizantoj **A** aŭ **B**).

La prezoj, en francaj frankoj, inkluzivas  
la afrankon por minimume 100-franka  
mendo. Por malpli ol 100-franka : aldoni  
20% aŭ pagi realan afrankon laŭ fakturo.

Por eldonigi manuskripton : sendu kelkajn specimen-  
ajn paĝojn kaj indikon pri la paĝkvanto. Se la ma-  
nuskripto estos akceptita, eblas peti ĝian lingvo-  
kontroladon fare de la Literatura Komitato de SAT.  
Pagado de la eldonkostoj : Laŭ la enhavo de la  
broŝuro, aŭ fare de la aŭtoro/tradukinto mem, aŭ  
tute aŭ parte per la kaso de la broŝurservo, se la  
broŝuro aperas en ties kadro.

**LISTO DE SAT-BROŝURSERVO**

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF
AA. La Aperoj de Ahasvero (Han Riner)	18
AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR)	6
AN. Nia angorplena socio (Milan Ŝimeĉka)	3
AO. Anarkio kaj organizo (Malatesta)	4
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	1
AR. Argentina Novelaro (18 noveloj)	18
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	18
BU. La racia kaj ateista budhismo	4
ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	6
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio	25
DU. Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario)	3
EA. Esperanto in 24 pages (angla)	1
EF. Espéranto de poche + Les 16 règles	6
EH. Esperanto en 24 páginas (hispana)	3
EL. Esperanto su 24 pagine (itala)	3
EK. L'Esperanto en 24 págines (kataluna)	3
EL. Elekto de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	12
ET. Etiko I (Kropotkin)	12
EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	4
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	4
FE. Esprimaro FrancaEsperanta (Bourgeois)	45
FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgeois) Esp./Fr.	8
FV. Fronte al la vivo (Krishnamurti)	4
FZ. Filozofio Zoologia (Lamarck)	20
GE. Abrégé de grammaire esp-o (Lentaigne)	7
HP. Humanitaristaj Principoj (Eugen Relgis)	3
IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaŭ)	5
IM. Individuista Manlibreto (Han Riner)	4
IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky	2
JA. Jaro 2000 (H. Muller) disdona ekonomio	30
KD. La Krimoj de Dio (Sébastien Faure)	4
KE. La Kvina Evangelio (Han Riner)	15
KF. Kontraŭflue (Valo)	10
KI. El la kara infaneco... (Valo)	12
KK. Komuna Kantareto	2
KP. Katastrofplano pri Fessenheim + Wyhl	5
LA. Lingvaj Anguloj (Baronnet)	8
LE. La laborista esperantismo (Lanti)	3
LK. La Konflikto (Le Dantek)	
+ Dubi (Alain) tr. Lanti	20

LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	45
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	15
LN. Linguistique et nonviolence (Masson)	2
MB. Imaga dialogo Marks/Bakunin (Cranston)	4
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	4
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Boétie)	4
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	10
NE. Naciismo kaj Esperantismo (S.Aarse)	8
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Armand)	4
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman)	35
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj)	15
PF. Proverbaro Franca/Esperanta (Bourgeois) + Esprimoj sankciitaj de l'uzado	12
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	3
PN. Politika Neperforto (M.A.N.)	6
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero)	4
PT. Piramido de l' Tiranismo (Domela Nieuwenhuis)	3
RA. Revolucia registaro. Pariza Komuno (Kropotkin)	5
RO. Rompoj (A.Jacquard)	4
SA. Kio estas SAT ? (H.Masson)	3
SJ. Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)	10
SN. Sveda Novelaro	30
SR. Les 16 règles commentées (R.Laval)	3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	4
TD. Tiel diru! (Lentaigne) supl. de DI por francoj	20
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	20
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VA. Varsovio 1887 (Lopez Luna)	12
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	10
VI. Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner)	18
VL1. Verkoj de Lanti 1. (Adamaĵoj, Absolutismo, Herezulo, Herezaĵo)	20
VL2. Verkoj de Lanti 2. (3 semajnojn en Rusio Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge)	20
VL3. Verkoj de Lanti 3. (Artikoloj, paroladoj kaj ekstraktoj el leteroj de 1937 ĝis 1946)	20
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti	18
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Hodinka, Ne mortigu!)	7
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel)	4

**POR APERIGO  
EN LA ADRESARO  
de LAŬTE! (nedevice!)**

Naskiĝjaro :  
Profesio :  
Telefono  
Ŝatokupoj :

Korespondpeto :

Kondiĉoj de gastigado :

Aliaj deziroj :

**MIA MENDO**

Prezo  
Kodo  
Kvanto

FF.

**SUMO**

skribota aliflanke

## Kiel funkcias la broŝurservo ?

Krom la gazeto "Laŭte!", Amika E-Rondo Aĝenia eldonas broŝurojn por propra broŝura serio, por la Broŝurservo de SAT, aŭ por aliaj personoj aŭ asocioj.

### ELDONADO

#### \* En la kadro de SAT-Broŝurservo/Laŭte!

La broŝuroj de tiu ĉi serio estas eldonataj iel kooperative per propra kaso de SAT-BS/L! Ili estas mendeblaj rekte al la BS aŭ al la kunlaborantaj libroservoj, aŭ riceveblaj aŭtomate per abono.

La BS ne povas pagi al tradukintoj/verkintoj. Eventuala "profito" ĉe sukcesa disvendado utilas por financi aliajn eldonaĵojn. Ĉiujare aperas en L! bilanco de la broŝurservo.

#### \* Por aliaj personoj aŭ asocioj

La aŭtoro/tradukinto pagas mem la eldonadon kaj mem zorgas pri la disvendado de sia broŝuro.

Se la enhavo de la broŝuro tion pravigas, parton de la eldonkvanto povas pagi kaj disvendi mem la broŝurservo, enigante la broŝuron en la serion ricevotan i.a. de broŝurabonantoj kaj de kutimaj kunlaborantaj libroservoj.

### MENDOJ AL LA BROŝURSO

La prezoj, en francaj frankoj, inkluzivas la afrankon por minimume 100-franka mendo. Por malpli ol 100-franka mendo : aldoni 20% aŭ pagi la realan afrankon post ricevo de fakturo.

Libroservoj, plurjaraj abonantoj de L! (monprovizantoj A) kaj broŝurabonantoj (monprovizantoj B) rajtas 20% da rabato kiam ili mendas por almenaŭ 100 FF.

### ABONO AL LA BROŝURA SERIO/LAŬTE!

Kiu deziras ricevi aŭtomate **Laŭte!** kaj, kun 20%-rabato, ĉiujn novajn broŝurojn kaj tiel kontribui al bona plufunkciado de la afero, tiu monprovizu per almenaŭ 100 FF. La abono validos ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo. Pri la stato de sia "konto" la monprovizanto ricevas informon ĉiun jarcion kaj ĉe baldaŭa elĉerpiĝo. Ne-reprovizado signifas aŭtomatan rezignon de la abono.

Por telefoni al la red. de BS/L! : Matene : 53.95.71.28 (peti Baudé = Bode!). Post la 14a : 53.95.75.03.

## ESPERANTO kaj la laborista esperantismo

### A. LOPEZ LUNA. Varsovio 1887. (Originalo, 76 p.)

Jen facile legebla, romanigita biografio de Zamenhof, bonvena ankaŭ por komencantoj. Oni perceptas Zamenhof viva, kaj kelkloke la verve de la rakonto forte tuŝas la leganton. Enkonduko de Ergoto de Bonaero.

### André CAUBEL. Nekonato : la Zamenhofa Homaranismo.

(Prelego, 24 p.) La plej kara idealo de Zamenhof kaj fonto de tiu "inter-na ideo", kiun heredis Lanti kaj lia sennaciismo. Verve prezentita kaj riĉe dokumentita prelego de nia karmemora "An Kaŭ".

### S. AARSE. Naciismo kaj Esperantismo. (Originalo, 72 p.)

"Rilate la temon "Naciismo kaj Esperantismo", Zamenhof trairis evoluon de la menso, kiel ĉiu serioza pensulo trairas. Se, en la unuaj kongresoj, li parolis pri patriamo, al kiu la esperantismo ne domaĝos, nur en 1914, ĵus antaŭ la unua mondmilito, li radikale esprimis sin kontraŭ la naciismo, en kiu ajn lando aŭ formo. Jena broŝuro estos eble kialo por sin nomantaj neŭtralaj e-istoj revizii sian starpunkton kaj konstati, ke la neŭtralismo de D-ro Z. ne plu estas aplikebla en la nuna tempo..."

### Henri MASSON. Kio estas S.A.T. ? (Prelego, 24 p.)

La radikoj, celaro kaj spirito de SAT ilustritaj per ekstraktoj el kongresdeklaracioj. "SAT estas unika. Ĝiaj principoj, celoj, strukturo kaj statuto prezentas vastegajn, apenaŭ ekspluatitajn eblecojn sur la kampo de socia progreso kaj aŭtentika tutmonda civilizo." Trafa varbilo kun necesaj adresoj.

### E. LANTI. La laborista esperantismo. (Originalo, 32 p.)

La ĝusta signifo kaj karaktero de S.A.T. Aparte valoras la ĉapitro, kiu aŭguras la sennaciigon de la homaj mensoj kiel kondiĉon por socialisma mondo, rolo neglektita de la laboristaj partioj kaj sindikatoj.

### E. LANTI. Naciismo - Studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj.

(Originalo, 76 p.) Reeldono de la fama verketo, klasikaĵo de la laborista E-movado. "La naciismo neniel estas pravigebla de la saĝo. Ni ŝatus, ke la leganto akiru tiun firman opinion ĉe la finlego de ĉi tiu studo."

### El Verkoj de E. LANTI, en tri volumoj (160 + 140 + 120 p.)

Unua vol. : Adamaĵoj, Absolutismo, Herezulo, Herezaĵo ekstraktoj el Leteroj.

Dua vol. : Tri semajnojn en Rusio (1922), Epiloge, Diskutejo (artikoloj el "Sennaciulo" kaj "Sennacieca Revuo"), Tro Plena Gramatiko (polemiko kun kdo Waringhien, kun ties respondo).

Tria vol. : Leteroj, artikoloj (1937/46) "Artikoloj riĉaj je ideoj, sed ideoj klaraj, neniam nebujaj. Tiu forta, akrefika inteligento, neniam embarasiĝas en erarigaj detaloj, ĝi rekte iras al la esenco, fulme trafas la kernon de la demando. La stilo estas ĉiam flua kaj neta."

### Vortoj de Kamarado E. LANTI (Originalo, 192 p.)

Dua eldono. La tutan filozofion de la fondinto de SAT vi trovas en tiuj artikoloj sagacaj kaj pripensigaj pri ĉio, kio koncernas la socian vivon.

**Leteroj de E. LANTI** (Originalo, 244 p.) En ĉi tiu libro (ariganta leterojn verkitajn ĝis 1938) troviĝas la senĝena pensesprimo de K-do Lanti pri la esperanta afero ĝenerale ; pri la skismo, kiu okazis en nia movado ; pri marksismo, bolŝevismo, judismo, moralo ktp. ; pri budaismo, Rabelezo, japanaj virinoj ktp. ktp. Fine, publikaj leteroj pri sennaciismo. "Leteroj de Lanti" apartenas al la malmultaj originalaj E-verkoj, kiujn nepre devas legi - ĉe se per kritikaj okuloj - ĉiu interesato pri la historio de la **vivanta Esperanto**. Dua eldono, 1987.

**N. BARTELMES. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro** (Orig., 94 p.) Ilustrita per kolekto da artikoloj kaj poemoj, jen la aŭtobiografio de la pioniro, kiu aktive partoprenis la vivon de SAT ekde ĝia naskiĝo, redaktis la asoci-organon, verkis rakontojn kaj novelojn, majstre tradukis "Faŭsto".n.

**VALO. Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo** (Originalo, 96 p.) Epizodoj el la longa sperto de la aŭtoro de "El la kara infaneco...", "Kontraŭflue", "Migrante tra Metioj", kaj esperantiginto de verkoj de Han Riner.

## LITERATURO

**R. LAVAL. Esperanto kaj Literaturo** (Originalo, 20 p.) Pripensoj pri la E-literaturo kaj konsiloj al tradukemuloj kaj verkemuloj. Senpretenda sed pripensiga studeto.

**ARGENTINA NOVELARO** (Trad. E.H.Garrote, 160 p.) 18 noveloj de diversaj aŭtoroj.

"Tiuĵ malnovaj noveloj, mi ne scias, kiel ilin ricevas la enlanda publiko, sed al eŭropa leganto ili frapas per forta ekzotika efiko - ĉu ili rakontas pri nuntempaj okazoj, ĉu pri malnovaj aferoj, de antaŭ cento da jaroj, en la kvazaŭ legendeca tempo de gaŭĉoj. La faktoj kaj la homoj aperas al ni aŭreolate de tipa atmosfero, kiu vivigas la kolorojn kaj vibrigas la sonojn..."

**Jack LONDON. Konstrui fajron** (Trad. D.C., 28 p.) La lukto de homo, akompanata de hundo, kontraŭ la norda malvarmo. Ĉu la homo sukcesos konstrui fajron ? Jen demando pri vivo aŭ morto.

**VALO. ...El la kara infaneco** (Originalo, 100 p.) Delikata verko aŭtobiografia jen sentoplena, jen pitoreska, jen grava, ĉiam interesa. Tra la okuloj de knabeto ni ekscias pri la vivmaniero en Sud-francio en la komenco de nia jarcento kaj pri tiamaj eventoj.

**LA BOETIE. Memvola servuto** (Trad. ROL, 32 p.) Klasikaĵo por ĉiuhorizontaj liberamantoj, speciale por liberecanoj...

**SVEDA NOVELARO** (Trad. F. Szilàgyi, 236 p.) Dudek noveloj, kiuj reprezentas aron da verkistoj, tute diferencaj unu de la aliaj, nur en unu rilato ili havas ion komunan inter si : ili ĉiuj estas aŭtodidaktoj...

**HAN RINER. La Turo de l'Popoloj** (Trad. Valo, 160 p.)

Tiu romano traktas la konstruadon de la turo de Babelo, simbolo de la unuiĝo de la homaro kaj de ties disiĝo pro rasaj kaj lingvaj diferencoj. Han Riner kaj lia tradukanto kdo Valo pentras kolore al ni la malnovan socion kaj pensmondon de la malnova Sumerio, poste nomata Babilonio. Neforgesebla verko.

## FILOZOFIO - PSIKOLOGIO

**KROPOTKIN. Etiko I** (traduko, 132 p.)

Por krei novan mondkoncepton kaj novan sociordon estas necesaj science argumentitaj etikaj konstrueroj, kiel gvidaj steloj, kiel fontoj de la inspiro. Kaj ĝuste tiaj estas la etikaj konstruaĵoj de Kropotkin, forte argumentitaj per la faktaro de la biologio kaj sociologio.

**HAN RINER. La Aperoĵ de Ahasvero** (Trad. Valo, 172 p.)

La "Vaganta Judo" aperas antaŭ famaj historiaj figuroj, kun kiuj elvolviĝas dialogoj pri diversaj temoj filozofioj : la morto, la potenco, la ribelo, la memvola servuto, k.a. Plia juvelo el la ampleksa verkaro de Han Riner.

**HAN RINER. La Kvina Evangelio** (Trad. Valo, 148 p.)

Konstante aktuala estas tiu bela verko (aperinta en 1910), en kiu Han Riner pruntis al Jesuo siajn proprajn pensojn kaj noblan idealon de pacisto, liberamanto kaj delikata filozofo.

**HAN RINER. La Veraj Interparoladoj de Sokrato** (Trad. LANTI, 146 p.) Jen alia ĉefverko de Han Riner, amiko de Lanti, kiu majstre tradukis ĝin. Jen la fine retrovita kaj nun disponebla manuskripto... Pliaj komentoj superfluas.

**KRISHNAMURTI. Eduko kaj vivsignifo** (Trad. RFG kaj Kribo, 40 p.). Eduko kaj vivsignifo. Vera eduko. Eduko kaj paco. Libero kaj lernado. Memkono. Pensoj. "La revolucio devas komenciĝi per interna, psika transformiĝo de l'individuo."

**KRISHNAMURTI. Fronte al la vivo** (Trad. kribo, 40 p.)

De la komenco oni estas kaptita de la raciaj kaj nekonformismaj paroloj de tiu hinda klerulo, kiu prelegas antaŭ gelernantoj, profesoroj kaj gepatroj en kolegioj. Al la neordinara enkonduko aldoniĝas kvar ĉefaj ĉapitroj : la Timo, la Libero, la Aŭtoritato, la Religio.

**Eugen RELGIS. Humanitaristaj principoj** (Trad. Pragano, 28 p.). La gvidprincipoj de la homaranista filozofo, liberecano, favora al Esperanto. Lia respondo al Lanti pri "Sennaciismo".

**Albert JACQUARD. Rompoj** (Trad. D.C., 32 p.) Ĉapitro el la verko "Ĉu riskas danĝeron la scienco?" de aŭtoro, kiu grave partoprenas en grandaj nuntempaj debatoj pri la socia rolo de la scienco.

**Rubén FELDMAN GONZALEZ. La nova paradigmo en psikologio.** (Trad., 260 p.)

La aŭtoro estas kuracisto-pediatrio-kirurgo kaj psikiatro-neŭrologo, universitata profesoro kaj direktoro de Infanaj Sano-Centroj en Kalifornio, Usono. La libro temas esence pri holokinetiko (= totala movo) kaj nova observado en la ĉiutaga vivo, edukado kaj psikoterapeŭtiko, kiun la aŭtoro nomas: "unueca perceptado". Li asertas ke tio estas urĝe bezonata por la alproksimiĝanta revolucio en la homa psiko. Li resumas tion jene: "La unueca perceptado, sole aŭ en la rilato, estas la nura aĵo kiu valoras - ĝi estas tio, kio sole gravas en la vivo, ĉar krom ĝi ne ekzistas kontakto kun la realo kaj la personoj". Li kontaktis persone mondkonatajn sciencistojn kaj edukistojn antaŭ ol publikigi ĉi tiun enpenetrantan kaj ege valoran verkon. Por ordinara nefakulo sufiĉas esti interesata pri la vivo kaj la homa sorto por kompreni kaj absorbi tion, kion la aŭtoro celas komprenigi tiel pasie kaj sincere. (Joek Naber-Keller)

**ERGOTO DE BONAERO. Psikotransformismo.** Por nova maniero de pensado. (Originalo, 28 p.) Resuma skemo de la verko de P. Ouspensky "Psikologio de la ebla evoluo de l'homo".

**El la "Pensoj" de Blazio PASKALO.** (92 p.)

La tradukinto, VALO, "flankelasis la partojn kun teologia aŭ pure religia enhavo, ankaŭ kelkajn fake filozofiajn, elektante tiujn kun pli ĝenerala signifo". Tiu konservita ekstraktaro estas certe tio, kion povas ignori neniu kulturama homo.

## LIBERPENSO

**LE DANTEK. La Konflikto** (Trad. LANTI, 122 p.)

**ALAIN. Dubi kaj aliaj artikoloj.** (Trad. Lanti, 14 p.)

"... Nemaŭte mi konstatis, ke ateistoj ne pli meritas la nomon liberpensulo ol la plej ortodoksa kredulo... Tiu libro liveras bonan ekzemplon de toleremo per tio, ke deisto kaj ateisto amike interdiskutas pri demandoj, al kiuj ili donas malsaman respondon...". Fine, 9 artikoloj de la franca filozofo ALAIN, trafe elektitaj kaj tradukitaj de LANTI por "Sennacieca Revuo".

**La racia kaj ateista budhismo** (adaptita kaj tradukita de T.F., 33 p.). Temas ĉi tie pri racia (sed neracionalisma) budhismo, same kiel ĝi estis en sia ekdisvastiĝo. En tiu ĉi verkaĵeto, sen azioinfluaĵoj, ĝi estas adaptita al la eŭropa nuna pensokapablo. Tiu tute "negativa vojo", krom profunda filozofio, ankaŭ estas praktika instrumento memliberiga, liberiganta el malkono, el praimpulsoj, el ĉia psikokateno. La realan liberon havigos al ni nek politikistoj nek pensistoj nek doktrinuloj nek iaj ajn mastroj. Sed ni mem provu atingi ĝin.

**Sébastien FAURE. La Krimoj de Dio** (Trad., 32 p.)

Du kontraŭreligiaj prelegoj de la fama anarkista oratoro.

**Ernest ARCHDEACON. La Mistero de nia surtera ekzisto**

(Trad. Caubel, 28 p.) Vigla pamfleto kun fortike argumentita rezonado ne nur kontraŭ la katolikan klerikaron, sed kontraŭ ĉiun religion, kontraŭ ĉian kredemon.

**Leo POLAK. Unueco super prokreda dividiĝo.**

**Leo POLAK. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo.**

(Trad. F. Munniksma, 12 p. + 16 p.)

Leo Polak estas unu el la grandaj reprezentantoj de monisma, liberpensa, do senkreda filozofio. Li pasie defendis la aŭtonomian, t.e. la propranorman filozofion kontraŭ la heteronomia, t.e. la ordona kredomoralo. Klare atestas pri tio tiuj du radioparoladoj faritaj en 1931 kaj 1932 por la Liberpensula Radiodisaŭdiga Unuiĝo en Nederlando.

## Ekonomio - Ekologio

**H. MULLER. Jaro 2000 : revolucio sen perdantoj** (Trad. de la Abundana Frakcio de SAT, 166 p.)

"Kvankam tiu verko prezentiĝas kiel romano, ĝi estas fakte didaktika. Tiu socio de la jaro 2000 aplikas la principojn elpensitajn de Edward Bellamy en la jaro 1888, kiuj estas jenaj :

- Oni rezignis la produktadon de neutilaj aŭ malutilaj varoj.
- Oni disvolvis ĉiujn aktivecojn ligitajn kun la libertempo.
- Oni aboliciis la salajran sistemon : ĉiu ricevas sumon laŭ sia socia rango, kaj ne perdas ĝin en kazo de senlaboreco aŭ emeriteco. La prezoj estas deciditaj de la aŭtoritatoj laŭ la rilato inter la ofertado kaj la mendado pri la varoj."

**Glyn ROBERTS. Ĉu ni vere helpas la trian mondon ?** (Trad. Gaïta Robert, 60 p.)

"Ĉi tiu verko apartenas al la malofta speco de tiuj politikaj pamfletoj, kiuj sukcesas esti sintezaj kaj samtempe bone ekipitaj per konkretaj ekzemploj. La aŭtoro estis dum multaj jaroj evolu-helpanto en la Tria Mondo kaj sin direktas al la homoj, kiuj volas havi similajn spertojn... La celo de la broŝuro estas pravi per konsekvenca rezonado, ke la nuntempa ideo pri evolu-helpantoj - fontanta el la liberala pensmaniero - utilas por konservi la nunan mondan ekonomian ordon..."

**Katastrofplano pri la atomcentralo de Fessenheim \* Verdikto de Wyhl** (Oficialaj tekstoj trad. de J. Lépeix, kun komentoj, 40 p.) La regantoj dormigas la popolojn per trankviligaj informoj, argumentoj kaj rezonadoj, laŭ kiuj la atomcentraloj estas sendanĝeraj, aŭ nur tre etdanĝeraj, eĉ pli ol aliaj energifontoj. Legante tiun broŝuron, oni ricevas teruran impreson...

**Murray BOOKCHIN. Por ekologia socio** (Esperantigis D.C., 120 p.) : Transe de la manko-tempo - Spontaneco kaj organizado - Ekologio kaj revolucia penso - Por ekologia socio - Pri la ekologia movado. "La detrupovo de tiu nia socio disvolvas sin laŭ senprecedenta skalo en la homarhistorio, kaj demence kaj kvazaŭ sisteme ruinigas la ensemblon de la vivanta mondo kaj ties materialajn bazojn. Estas tempo transpasi ĉiujn grandajn rompojn, kiuj apartigis la homon disde la homo, la homaron disde la naturo, la individuon disde la socio, la urbon disde la kamparo, la spiriton disde la korpo, la racion disde la sento kaj ĉiun generacion disde la aliaj... La situacio ektransformiĝas. La ekologia krizo tendencas renversi la tradician maksimumon "Por vivi, endas unue plu-vivi". Hodiaŭ, se ni volas plu-vivi, ni unue vivu. La solvoj estas laŭmezure de la problemo, aŭ la naturo terure venĝos kontraŭ la homaron..."

**A.P.J.R. (Asocio por la Protekto kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj). Ses alvokoj al la homa konscienco.** (62 p.).

Tiu broŝuro arigas jenajn tekstojn : Tute antinukleaj - Kodo de scienca deontologio - Alvoko al la Homoj - Reguloj de deontologio pri Laboro - Individuaj liberoj - Kodo de komunika deontologio. - Ni decidiĝu.

Tiuj alvokoj celas ne nur alarmi la publikon pri la nocivo de ĉiuj jonigantaj radiadoj sed ankaŭ arigi subskribojn de ĉiuj (individuoj kaj asocioj) konsentantaj agi sur propra kampo konforme al tiuj alvokoj por prepari mondon liberigitan el niaepokaj timoj : mondmilito, totalismo, atomdanĝero...

## SCIENCOJ

**LAMARK. Filozofio zoologia.** (Trad. VALO, 140 p.)

Duonjarcenton antaŭ Darvino, LAMARK komprenis, ke la specioj devenas unuj de aliaj per longdaŭraj transformiĝoj. Per tiu ĉi verko Lamarko evidentiĝis ne nur kiel elstara sciencisto, sed ankaŭ kiel unu el la plej liber-pensantaj homoj de ĉiuj tempoj.

## DIVERSAĴOJ

**Komuna Kantareto** (44 p.) La plej konataj kantoj (do sen muzik-notoj) plus kelkaj pli modernaj, de "La Espero" ĝis "Blovos la vent'".

**Arthur AZEVEDO. Amo per proverboj.** (Trad. A. Couto Fernandes, 24 p. A6).

Unuakta komedio, du gerolantoj kaj amaso da proverboj parte ĉerpitaj el tiuj kolektitaj de Zamenhof. Taŭga teatraĵeto por konversacia kurso aŭ kultura vespero.

**G. BALKANSKI. La Bazoj de Anarkiismo.** (Trad., 148 p.)

La plej kompleta skizo aktuala pri anarkiismo en esperanto. Jenaj ĉapitroj : Origino de la senestrecaj ideoj kaj movado - Senestrecaj principoj - Institucioj de la aŭtoritato - Instrumentoj de la regpovo - Realigaj rimedoj kaj taktiko - Konstruiva anarkiisma programo.

**E. MALATESTA. Anarkio kaj organizo kaj aliaj tekstoj**

(Trad. Kribo, 32 p.) La argumentoj de Malatesta kontraŭ la emo, pro strebado al "efikeco", konstrui strukturitan organizon, en kiu discipline kunaktivus la diversspecaj liberecantoj. Lia rebato al la vidpunkto de P. Monatte, ke sindikatismo sufiĉas per si mem. Krome, biografio kaj resumo de la dialogo "Inter kamparanoj".

**BAKUNIN. Elekto de tekstoj (1867-1873)** (Trad. D.C., 58 p.)

En tiuj paĝoj estas pritraktitaj tre diversaj temoj : libereco individua kaj socia, ĝiaj rilatoj kun ŝtato, patrio, naciismo ; sindikata burokratismo, balotado, "popola ŝtato", leĝoj, heredrajto, familio, kultoj, asocioj, komunumoj. Pluraj el tiuj temoj ne nur konservis intereson, sed eĉ akiris en la nuna tempo pli freŝan kaj akutan aktualecon. Ĉiuj estas observataj el la vidpunkto de memstara, ege klara inteligento... Riĉa mino da ideoj meditindaj, studindaj, diskutindaj...

**DOMELA NIEUWENHUIS. La Piramido de l'Tiranismo** (Trad.

D.J., 32 p.) La granda anarkiista figuro el Nederlando analizas la ekspluat-sistemon. Kiel sin liberigi de tio ? Per subfosado de ĉia aŭtoritato, ĉiu laŭ sia maniero, ĉie kie li/ŝi povas.

**KROPOTKIN. Revolucia registaro aŭ anarkio ? - Anarkista agado en la revolucio - La Pariza Komunio - kaj aliaj tekstoj** (Trad. Kribo, 56 p.)

La esencaj konceptoj, postuloj kaj argumentoj de anarkio, klarstile esprim-itaj de unu el ties plej gravaj pensuloj. "Kiam neeviteble aperas malutilaj influoj, aŭtoritataj tendencoj, oni ne kredis ilin perforte neniigi ; ekzistas alia rimedo multe pli bonefika : "fari apude ion pli bonan".

**HAN RINER. Individuista manlibreto.** (Trad. Valo, 36 p.)

Filozofia tezo pri individuismo, prezentita en formo de dialogo. Altnivela verko agrable legebla.

**Félix LAGALAURE. La individualisma socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky** (Originalo, 16 p. A6)

Eta biografio, sekvata de resumo pri la progresemaj ideoj publikigitaj de A.R.P. en Nica gazeto (1921-22). El la "ismoj", A.R.P. elektis : el komunismo, tion, kio necesas ; el anarkismo, tion, kio eblas... por starigi konstru-povan sistemon...

**Emile ARMAND. Nia individuismo.** Ĝiaj depostuloj kaj tezoj per demandoj kaj respondoj. (Trad. D.C., 32 p.)

La liberecana individuismo, priskribita de la fama franca anarkisto.

**Maurice CRANSTON. Imaga dialogo Marks/Bakunin.** (Trad. D.C., 32 p.) Dum radio-elsendo el B.B.C., sperta sociologo, M. Cranston, kiu perfekte konas sian temon, imagis dialogon inter Marks kaj Bakunin dum ilia renkontiĝo en Londono la 3an de novembro 1864. La aŭtoro klopodis restarigi, laŭ iliaj apartaj tezoj disvolvitaj en iliaj respektivaj verkoj, verŝajnan diskuton, kiu rivelas rimarkindan erudicion. Oni tie ĉi retrovos, majstre portretitaj, la du homojn, kiuj elstaris en sia epoko sur la socia kampo, en akra debato pri tiu temo eterne aktuala : Ĉu oni fidu la liberecon ? Aŭ male, ĉu la aŭtoritato estas nepre necesa ?

**LANTI kaj IVON. Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio ?** (Originalo, 52 p.)

Lanti respondis tiun demandon jam komence de la jaroj '30. Dume, oni plu "konstruadas" en Sovetio, kaj ankaŭ aliloke nun, sed la analizo de Lanti kaj Ivon restas leginda, eĉ de nesamopiniantoj...

**PARIO. Durruti, simbolo de la hispana revolucio** (Originalo plus du aldonoj trad. Kribo, 24 p.)

Durruti kaj lia influo en la politika, socia kaj revolucia vivo en Hispanio.

**Anton PANNEKOEK. Sindikatismo - Sovetioj** (Trad. Kribo, 28 p.) "La vera organizo, kiun bezonas la laboristoj en la revolucia procezo, estas organizo, en kiu ĉiu partoprenas, korpe kaj mense, tiel en la agado kiel en la gvidado, en kiu ĉiu pensas, decidas kaj agas... La profesiaj gvidantoj ne havas lokon en tia organizo..."

**Milan ŜIMEĈKA. Nia angorplena socio.** (Trad. Aldo Revel, 24 p.) - Sociologia eseo.

"Timo ne estas eterna, ĝia konservado eĉ lacigas, precipe kiam la ideologio, kiu tiun timon subtenas, jam de longa tempo perdis objektivan sencon." La silenta luktado en Ĉeĥoslovakio deponit 1968...

## PACISMO - NEPERFORTO

**VALO. Kontraŭflue** (Originalo, 104 p.)

El taglibro de 14-jara knabo, en 1914, malfermiĝas vasta panoramo pri la 1914-1918-aj jaroj, panoramo el regiono malproksima de la batalkampoj, en kiu la homoj klopodas pli-malpli sukcese kaj malfacile elteni la tiaman vivon, laŭ la propraj spertoj kaj sentoj de juna knabo. (Daŭrigo de "El la kara infaneco...")

**Jean LASSERRE. Ĉu militista nacidefendo estas kredebla ?** (Trad. R. Laval, 36 p.)

"La paroloj de la anoj de neperforto ofte naskas ridetojn. Oni volonte nomas ilin utopiistoj kaj senrespondecaj revuloj. Laŭdire, ilia tezo, laŭ kiu estas tempo anstataŭigi la militistan nacidefendon per neperforta defendo, ne estas kredebla. Sed ĉu la militista sistemo estas tiom kredebla ? Tiun ĉi precizan demandon ni volas priententi..."

**M.A.N. (Franca Movado por Neperforta Alternativo). Por memmastruma socialismo : Politika Neperforto** (Trad. Pacista Frakcio de SAT, 60 p.)

Politika orientado de M.A.N.. Tiu broŝuro aparte reliefigas memmastrumadon kaj strategion de transiro al socialismo.

**El verkoj de Leo TOLSTOJ : Patriotismo kaj registaro - Al Politikistoj - Ĥodinka - Ne mortigu!** (Trad., 72 p.)

Sub kvar malsamaj titoloj, ĉiu detale esplorita, Tolstoj traktas pri la samaj kernaj temoj : homaj solidareco kaj libereco. Nia sociordo estas klarvide observata kaj profunde primeditata. Antaŭparolo de R. Rolland.

**Maurits DEKKER. La Mondo ne havas atendejon** (Trad. Faulhaber, 80 p.)

Triakta teatraĵo pri la atombomba danĝero. "Necesas, ke ĉiu homo sur la tuta tergloba vidu kaj legu la teatraĵon. Kaj al kiu ni povus turni nin pli ĝuste ol al la internacia esperantistaro?..."

## Eldonprojektoj por la venontaj jaroj

**SLANINA, ŜMIDRKALOVÁ. Esperanto per INTER-metodo** (internacie uzebla kurslibro)

**Viktoro HUGO. Legendo pri la bela Pekopeno kaj la bela Boldura** (el la franca, trad. Valo)

**Bernard TRAVEN. La Mortula Ŝipo** (el la germana, trad. H.H.)

**Joseph ROTH. La Ribelo** (el la germana, trad. Tarsen Regis)

**Frederi MISTRAL. La Poemo de Rodano** (el la provenca, trad. Valo)

... kaj reeldonoj laŭ ĉies sugestoj...

*Efektivigo de tiuj projektoj dependas de ĉies interesiĝo. Abonu al la broŝuro serio por certigi plufunkciadon de la afero!*



## POR VARBI

Por anglalingvanoj : **Esperanto in 24 pages**  
Por hispanlingvanoj : **Esperanto en 24 páginas**  
Por itallingvanoj : **Esperanto su 24 pagine**  
Por katalanoj : **L'Esperanto en 24 pàgines**

Tiuj broŝuretoj enhavas la gramatikajn regulojn kun ekzemploj kaj fundamentan vortaron.

## POR PERFEKTIĜI

**F. BARONNET. Lingvaj anguloj (80 p.)**

La aŭtoro "celas respondi al la plej ofte renkontitaj demandoj, kies respondoj konsistigas la ĝeneralan strukturon de nia lingvo. Li esperas utili al la kamaradoj, kiuj deziras bazi siajn praktikajn konojn de la lingvo sur gramatika fundamento, prepari porinstruajn ekzamenojn aŭ simple respondi al prilingvaj demandoj..."

**LENTAIGNE. Kiel diri...? (praktika esperanta frazeologio, 5000 esprimoj, 156 p.).**

"Ni deziras krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn vortkonstruojn, kaj tiel helpi ilin atingi fluan parolkapablon laŭ vere zamenhafa stilo. Por tio ni provizas ilin per materialo relative abunda, en kiu ili trovos verŝajne la eblon solvi multajn problemojn. La esprimoj estas kliŝitaj dirmanieroj, sankciitaj de la uzado. Ili estas grupigitaj ĉirkaŭ 67 "ideoj" arbitre elektitaj, laŭ la gvidlinio : asociado de la ideoj, ĉiufoje kiam eblis..."

Plurfoje reeldonita, tiu internacie uzebla lernilo ĝuas grandan sukceson. Kompletigas ĝin "TIEL DIRU!" (vd. "Por franclingvanoj"), kompilita speciale por franclingvanoj sed profite uzebla ankaŭ de alilingvanoj.

## POR FRANCLINGVANOJ

### Por varbi kaj inici

**Les seize règles de l'espéranto** commentées par un espérantiste français à l'intention des élèves francophones (16 p.)

"Les fameuses "16 règles" dont on parle souvent sans les avoir lues... Nous nous sommes bornés ici à quelques remarques et réflexions destinées à attirer l'attention du lecteur sur quelques-uns des pièges que lui tend notre langue maternelle..."

## POR FRANCLINGVANOJ

### Por varbi

**Henri MASSON. Linguistique et non-violence** suivi de :  
**P. FIEMEYER : Une langue internationale pour écologistes et non-violents (16 p.)**

Kelkaj pripensoj pri lingvistika perforto, por ke tiu aspekto de la problemo ne estu subtaksata en la esplorado de la deveno, prevento kaj solvo de la konfliktoj. Trafa varbilo por neperfortulaj, pacistaj, ekologiaj medioj.

### Por inici

**Espéranto de poche (82 p. A6)**

Simile al "Esperanto en 24 paĝoj", tiu broŝuro enhavas krome tre riĉan, 2800-radikan vortaron Fr./Esp. kaj suplemente : **Les seize règles de l'Espéranto** commentées par un espérantiste français à l'intention des élèves francophones" (R. Laval)

**AN KAŬ. Initiation à l'Espéranto (44 p.)**

"Ce petit cours se propose de donner un aperçu de l'esperanto... en faisant appel le moins possible aux explications grammaticales... On a voulu prévenir, dès le départ, les fautes les plus communes aux Français qui apprennent l'esperanto. Pour appuyer l'inévitable effort de mémoire, on s'aidera de proverbes et de petites chansons. On ne doit jamais oublier que le langage est avant tout parole..." Dek-unu lecionoj vervoplenaj kaj bonhumoraj..."

### Por perfektigi

**LENTAIGNE. Abrégé pratique de la grammaire Espéranto (36 p. + suplemento : "Parler et enseigner")**

Tiu broŝuro ne celas klarigi la tutan funkciadon de nia lingvo, sed, verkita por franclingvanoj far iu, kiu havas longan pedagogian sperton, ĝi fingrotuŝe montras al la progresantoj la statistike plej oftajn erarojn tipe francajn. Ankaŭ la fina enhavotabelo kun la paragrafnumeroj estas oportuna : ĝi ebligas tuj trovi la tiklan punkton... Jen valora broŝuro, rekomendinda ne nur al progresantoj, sed ankaŭ al kursgvidantoj, kiuj tiel povus tuj trovi klarigon - simplan kaj praktikan - al la eraroj de siaj lernantoj.

**LENTAIGNE. Tiel diru! (5000 expressions, 128 p.)**

Kvazaŭ suplemento al **Kiel diri...?**, **Tiel diru!** sin turnas al franclingvanoj, sed povas ĉerpi el ĝi ankaŭ alilingvanoj. Kiu posedas ambaŭ disponos pri ĉ. 8000/9000 malsimilaj esprimoj. Por ĉiuj kernaj vortoj, alfabeto ordigitaj,

**Tiel diru!** liveras la ĉefajn tipajn E-esprimojn. Ekzemple :

**CHEVEU (HARO) \* Dissplitigi harojn (couper des cheveux en quatre) (= harfendado) \* Ili kaptis unu la alian je la haroj (se sont crépés le chignon) \***

Lia vivo pendas de hareto (ne tient qu'à un cheveu/fil)

La tipaj esprimoj de la franca lingvo esperantigitaj :

En 3 broŝuroj (la "trilogio") de Lucien BOURGOIS

\* **Laŭ la fluo de l'interparolo** (Konversacia gvidlibro Franca-Esperanta, 88 p.)

Tiu verko celas provizi la E-parolantojn per materialo uzebla en la ĉiutaga interparolo. En oportuna formato A6, jen broŝureto nepre havenda en ĉies poŝo!

\* **Proverbaro Franca-Esperanta + Esprimoj sankciitaj de l'uzado** (68 p.) kun ilustraj de J.P. Peru.

\* **Esprimaro franca-esperanta** (240 p.)

Jen grava verko, kiu kontentigos ĉe francaj esp-istoj - kaj ĉe la nefranc-lingvaj, kiuj lernas la francan - la bezonon je oportuna kompilaĵo el "esprimoj eltiritaj unuflanke el la nuntempa franca uzado, aliflanke el la ankoraŭ juna, tamen plene sukoriĉa lingvo esperanto", kiel skribas André Gilles en sia enkonduko. Kunlaboris ankaŭ Georges Lagrange.

(La esprimoj estas alfabeto ordigitaj)

\*\*\*\*\*

Multaj el la iam eldonitaj broŝuroj estas nun elĉerpitaj. Jen kelkaj el la "malaperintaj" titoloj. Se venos sufiĉaj antaŭmendoj, la broŝurservo povos entrepreni reeldonadojn. Skribu al ni tiucele, precizigante kiun reldonon vi ŝatus kaj kiom da ekzempleroj vi pretus akiri.

- \* Abundo kaj konsumsocio (Duboin/PV.Berthier) \* Antropogenezo (Pannekoek)
- \* Civila malobeemo (HD.Thoreau) \* Al la Junuloj + Biografio (Kropotkin)
- \* La forto de la fortaj (Jack London) \* Esperanto or English? (Masson)
- \* La homa animo sub socialismo (O. Wilde) \* Historio de SAT (1953/81)
- \* Individuismo en Antikveco (Han Riner) \* La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes (Han Riner) \* Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg) \* Nekomb- itaj pensoj (S.J.Lec) \* La rajto de pigro (Paul Lafargue) \* Paco en Proksima Oriento (Cohen) \* Du rêve à la réalité (Masson) \* Rido sanigas! (Burger) \* Tabakismo kaj emancipiĝo (H.Masson) \* La triviala homo (Ingenieros) \* Tiu, kiu ne volas morti (Jean Rostand) \* Tra la mondo per biciklo (A. Péraire) \* Unu aŭ nul (Guy Marchand) \* Vivi en komunumo (M. Schneller)

\*\*\*\*\*

Nia adreso :

**Cercle amical esp. agenais**  
**F 47340 LAROQUE TIMBAUT**  
poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista \*



eldonata de

**Amika E-Rondo Aĝenia**  
(Cercle amical esp. agenais)  
F 47340 LAROQUE  
pĉk: 3371 74 M Bordeaux)

1977/1987 \* 10 JAROJ \* 74 numeroj

**Laŭte!** (L!) celas plejeble favori liberan esprimadon de ĉiuj siaj abonantoj pri ĉiuj temoj, sen tabuo kaj sen cenzuro. Tiucele ĉiu abonanto povas sin esprimi per originalaj artikoloj, rebatoj kaj desegnaĵoj. (Krome, L! povas aperigi - eventuale felietone - pli longajn tekstojn, kiuj povus konsistigi maldikajn broŝurojn) Ĉar L! celas favori ankaŭ rektajn interrilatojn inter la abonantoj, tiuj povas aperigi anoncetojn senpage, kaj ricevas, principe ĉiun duan jaron, ĝisdatigatan adresaron.

**Laŭte!** aperigas 5 aŭ 6 numerojn jare. La amplekso estas minimume 36-paĝa, kun ebleco atingi 72 paĝojn en A5-formato, laŭ la abundo de la materialo. Proksimumaj aperdatoj : 1. Fine de januaro - 2. Fine de marto - 3. Meze de junio - 4. Meze de septembro - 5. Fine de novembro. Kroma numero, se necese, komence de majo.

Ĉar **L!** estas ne organo de asocio, sed esprimilo de abonantoj, povas aboni ĉiu ajn esperantisto, komencanta aŭ pli lerta, sendistinge de fako aŭ tendenco.

Kiel pagi :

Ĝenerala regulo : Kiuj loĝas en landoj, de kie eblas sendi monon al Francio per ĝiroj al poŝtkonto, tiuj preferere uzu tiun rimedon, rekte ĝirante al pĉk-numero: 3371 74 M Bordeaux, profite al CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS.

Se ili pagas per bankĉeko, abonantoj loĝantaj ekster Francio atentigu, ke la enkasigo de ĉeko kostas en Francio proks. 1/2 el unujara abono al L! Ili do konsekvence plialtigu la valoron de sia ĉeko.

Eblas pagi ankaŭ per internaciaj respondkuponoj, bankbiletoj, neuzitaj francaj poŝtmarkoj. (Nepagipovaj landoj : filatelioj, E-libroj... post interkonsento).

\* Por ricevi specimenon de "**Laŭte!**" sendu 2 irpk.

En iuj landoj eblas pagi al perantoj :

Aŭstralio : Vlado KOSEF, 58 Green St., Cobar, N.S.W. 2835

Brazilio : G. LEDON, Rua Maria Aparecida Anacleto 111, 04809 Sao Paulo

aŭ : Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11-1105, 70084 Brasilia - DF

Japanio : TUBOTA kōki, Higasimikuni 3-9-12-816, Yodogawa-ku, Oosaka-si, 532.

Svedio : Pelle PERSSON, Svartviksvägen 14, 123 52 FARSTA

Donacitaj abonoj : Eblas donaci abono(j)n por amikoj nepagipovaj al adresoj menciitaj de la donacantoj aŭ al adresoj elektitaj de la red. de L!

Abono validas principe de januaro al decembro. Al tiuj, kiuj abonas en la jaro, ni laŭeble sendas la jam aperintajn numerojn, aŭ, se ne eblas, konsekvence prokrastas la finon de la abono. Kun la lasta numero la abonanto ricevas la informon pri fino de sia abono.

Neabonanto, kiu deziras aperigi informon, reklamon, anonceton en L! pagu minimume abonon por unu jaro.

Principe, L! ne interŝanĝas kun aliaj E-gazetoj, nek sendas senpage kroman ekzempleron al artikolverkinto.

**Monprovizantoj** : "Monprovizanto" estas abonanto, kiu sendas minimume 100 FF por ricevi dum pluraj jaroj :

- nur **Laŭte!** (monprovizanto A)

- **L!** + novaĵojn de la Broŝurservo (monprovizanto B).

La monprovizantoj rajtas 20-procentan rabaton por siaj broŝur-mendoj, kiam ilia mendo atingas 100 FF.

**Varbado** : La varbado de novaj legantoj de L! kuŝas ĉefe sur la iniciatoj de la abonantoj mem. Varbemuloj povas :

- prezenti ekzemplerojn de L! okaze de loka aŭ regiona renkontiĝo (peti provizon de L!-specimenoj al L!-sidejo)

- sendigi L!-specimenojn al adresoj donitaj de ili al la red.

**Nombro da abonantoj** : Tial ke **L!** estas prizorgata de nur tre malmultaj personoj, ne eblas senlime kreskigi la eldonkvanton. Principo estas, ke estas preferinde kontentigi (ĝis) 450 personojn ol malkontentigi la duoblon!

**Kas-bilanco** : Por ke ĉiu abonanto plejble sciu pri la farto de sia gazeto, ĉiujare aperas en L! resumita kas-bilanco. Se necese, pliajn informojn L!-red. volonte liveras.

Ĉiu alineo de tiu ĉi "funkci-principaro" povas ricevi modifon laŭ sugestoj de abonantoj, se tio celas plibonigi la funkciadon de la afero. Antaŭdankon al ĉiuj gekunlaboremuloj !

## DU NEBANALAJ HELPO-PETOJ

-----

**Korespond-peto.** Mi serĉas bonan korespondant(in)on, sed ne nur por skribi leterojn. Ne ektimu! Mi estas surdiĝinto. Ne problemas. En Okcidenta Germanio neniu homo rimarkigas al mi, ke mi estas surda. Pri mia malhelpaĵo oni ne vidas. Kelke da iuj diras al mi, ke mi estas eksterlandano. Normale parolante mian patrinan lingvon, apenaŭ estas kredeble, ke mi kiel surdiĝinto scipovas Esperanton. Sed al mi mankas la parolado. Mi demandas vin, kiu volas helpi al mi paroli kun mi Esperanton? Mi prefere volas trovi instruist(in)on honestan, kiu havas iom da tempo por mi. Kiu el vi povas kompreni bone al la aŭde damaĝitoj? Ankaŭ estas antaŭvide reciproka vizito planota. Mia urbo estas bone atingebla per trajno, proksime al la landlimo germana-franca. Mi opinias, ke elparoligo vere estas grava afero por mi. Mia hobbio estas kolektado de poŝtmarkoj, ankaŭ interŝanĝi ilin. Mia ĉefa ŝatokupo nature estas ESPERANTO. Estas skribita mia telefonnumero. Fine de ĉi tiu jaro mi ricevos nur skribo-telefonon. Bonvolu sendi al mi prospektojn pri la ilo MINITEL nur esperantlingve.

Adreso: Gert HEINTZE, Rheinauer Ring 121/1, D-7550 RASTATT, FRG.

Tel: 07222 28194 (Eblas paroli nur germane, alie skribi sur telefono)

**Helpo-peto.** Mi petas vian helpon por mia fonetika laboro por la ekzamenado de Esp-o. Mi ekzamenas la E-prononcon de diversnacianoj kaj poste la komputilo ĝin prilaboras. La komputilo preparas t.n. sonogramojn de la diversaj intonacioj kaj tiel ili estas science kompareblaj. En la Fonetika Laboratorio de nia Hungara Sciencakademio jam oni prilaboris la prononcon de diversspecaj lingvoj, sed ankoraŭ mankas Esperanto. Mi petas pro tio surbendigi en kasedon jenan frazon: **SOMERE LI VETURAS EN VARSOVION** per jenaj intonacioj: 1. Neŭtrale. 2. Rezigne. 3. Konsole. 4. Ekscitite. 5. Ordoŝe. 6. Plende. 7. Malame. 8. Malcerte. 9. Superbe. 10. Moke. 11. Flirtante. 12. Demande. 13. Mirege. 14. Prijuĝante.

T.e. vi boncolu diri 14-foje la saman frazon per la 14 diversaj ĵus menciitaj intonacioj, sed vi ne anoncu la intonacion, nur faru, ĉar la komputilo nur tiel povos utiligi ĝin. Poste, denove bonvolu sen iu ajn anonco zumi la "melodion" de la 14 intonacioj de la sama frazo per fermitaj buŝoj, kaj ankaŭ tion surbendigi. Mi petas fari unusekundan paŭzon inter la frazoj ĉiam!

Oni bezonas tute perfektan magnetofonon por la surbendigado, sen iu ajn interna aŭ ekstera bruo, ĉar poste la komputilo ne povas diferencigi la internan bruon kaj la valoran tekston! Mi petas sendi la kasedon al mia adreso. Mi resendos ĝin, aŭ alian kasedon kun hungaraj popolkantoj en Esp-o. Ĉi tiu laboro estas urĝa, pro tio mi petas vian rapidegan helpon el diversaj landoj. Mi jam havas hungaran (mian), novzelandan kaj ĉeĥan intonaciojn. Mankas la aliaj! Bonvolu helpi!

Mi dankas!

dr. Zsuzsanna Agnes Berényi, H-1072 Budapest, VII. Dob u. 16. II. 39

T: 210-836 Hungario.

## NOVAĴOJ DE SAT-BROŜURSERVO kaj LAŬTE!

Tiu ĉi numero enhavas unuafoje la detalan komentitan liston de ĉiuj nun disponeblaj broŝuroj. El kelkaj restas nur malmultaj ekzempleroj. Abonilo/mendilo donas al vi la prezaron. Ĉar la katalogo estis multobligita en julio, bonvolu noti jenajn intertempajn modifojn:

\* Amo per proverboj (AP)

\* Esperanto de poĉe

\* Esperanto en 24 paĝoj por katalunoj (EK)

\* Fronte al la vivo (Krishnamurti)

} estas  
elĉerpitaj

Por eviti konfuzon en la kontoj, restas peranto en Japanio nia jam de longe fidela amiko MINE Yositaka. Amiko TUBOTA zorgas aparte pri perado por SAT.

\*

La Broŝurservo havas aparte pezan liston de eldon-projektoj por la venonta(j) jaro(j). (Vd. p.9 de la katalogo!). Mi bedaŭras, ke pro superŝutiteco unuflanke kaj zorgo pri kas-ekvilibro aliflanke ankoraŭ ne povis aperi pluraj jam de kelka tempo anoncitaj broŝuroj. Ĉar la superŝutiteco certe ne estas survoje al malpliigo, kaj ĉar la nombro da broŝur-abonantoj garantiantaj minimuman eldonkvanton, ne sufiĉe kreskas, mi petas paciencon de posedantoj de manuskriptoj, kies publikigon mi devas prokrasti.

L!-abonantoj, kiuj ankoraŭ ne abonas la broŝuran serion, kaj deziras favori ĝian plueldonadon, povas profiti de la jarfina periodo por mendi aŭ - prefere! - aboni la serion!

\*

**La venonta n-ro de Laŭte! aperos fine de januaro.** Por ĝi jam atendas multaj artikoloj, krom la fino de "Ekologio - ĉu ideologio?" kaj la kutimaj rubrikoj : poemoj, nova debato ("La krizo : kiu elirejo?"), eseeto pri "la Biologio de l' kondutado", ktp, kc. Ankaŭ ĝi estos do "duobla", t.e. ĉ. 72-paĝa.

\*

Broŝurabonantoj, kiuj laste ricevis "Filozofio zoologia", notu ke ili ricevos "Leteroj de Lanti" kun la unuaj broŝuroj planitaj por 1988. (La romaneto "La Ribelo", jam tajpita, estos preta espereble komence de 1988)

Al ĉiu laŭtu(in)o amikan penson de via Kribo

### VIA SITUACIO

Via abono  
al L! estas  
registrita ĝis

En via BS/L!-konto  
Restas:  
Mankas: